



Bruno Gröning:



Mi vivas
por ke la homaro
vivu plu

Grete Häusler



Bruno Gröning

“Kiu amas Dion, tiu amas la homon”

Bruno Gröning

*Mi vivas,
por ke la homaro
vivu plu*

Grete Häusler



Grete Häusler GmbH - Verlag

©1999 by Grete Häusler GmbH - Verlag
Rheindahlender Str. 78
D-41189 Mönchengladbach
Tel.: +49-2166-958010
Fakso: +49-2166-59231
Germanio
1a eldono 1999

Ĉiuj rajtoj, ankaŭ tiuj de parta represo, de fotomekanika reproduktado same kiel la prilaborado por radiodramo, sendado per radio, filmigo kaj tradukado en aliajn lingvojn estas strikte rezervitaj ĉe Grete Häusler GmbH - Verlag.

Tuta produktado: Grete Häusler GmbH eldoneja presejo
D-93087 Alteglofsheim
Germanio

Germana originala eldono ISBN 3-980 1302-1-5

Tradukoj en jenaj lingvoj:
angla: ISBN 3-927 685-96-8
franca: Mendonombro 120.1 F
nederlanda: ISBN 3-927 685-79-8
rusa: ISBN 3-927 685 59-X
pola: Mendonombro 120.1 PL
rumana: Mendonombro 120.1 RO
hispana: Mendonombro 120.1 E
hungara: Mendonombro 120.1 H

Enhavo

Antaŭparolo	7
Infana kaj junula tempo	10
Familio, laboro, militkaptiteco kaj hejmvreveno 1949-Herford	15 17
Kion hodiaŭ signifas la okazaĵo de Herford antaŭ dudek kvin jaroj por la amikoj de Bruno Gröning?	24
Kion Bruno Gröning sciigis al ni jam en Herford?	26
Bruno Gröning kaj la kuracista scienco en Heidelberg	28
La apero de Bruno Gröning en la publiko	37
La TEDEUMO de Rosenheim	40
Kiu ne volas aŭdi la vorton, tiu ne bezonas serĉi la helpon kaj saniĝon	44
Gröning - dokumentada filmo	55
La vojo de Bruno Gröning	57
La “ĉi-estado” de Bruno Gröning	64
La verko de Bruno Gröning	73
Sukcesraportoj	75
Finparolo	82
Indiko pri la fontoj	86
Mi rekomendas	87

Antaŭparolo

Ĉi tiun libreton mi skribis kaj kompilis okaze de la 25a memorjaro pri la apero de Bruno Gröning en la tutmonda publiko en Herford en la jaro 1949. Tiam, en la jaro 1974, mi titolis ĝin per: Bruno Gröning, 25 jaroj da tutmonda ago.

Hodiaŭ, en la jaro 1984, mi volas republiki ĝin prilaborita. Ĉio, kion Bruno Gröning antaŭvidis, ĉiam pli alproksimiĝas al la realeco.

En la gazeto Rhein-Sieg-Anzeiger de la 15a de februaro 1984 ni legas sub la titolo: Estonteco malantaŭ betono? i. a. la jenon:

Malvarma stelo.

Evidente maleksiis ankaŭ la ŝatantoj de protektokonstruaĵoj, kion usonaj kaj sovetiaj sciencistoj antaŭ mallonge sendepende prikalkulis: Se la superpotencaj ŝtatoj detonacius nur dekonon de sia nuklea detruiga potencialo super la urbegoj, tiam sekve de la klimataj ŝanĝiĝoj la tero ŝanĝiĝus al malvarma stelo; la homaro frostmortus, tion la ekspertoj el oriento kaj okcidento samopinie konstatis, se ĝi ne jam antaŭe mortus pro malsato.

Tiaj kaj similaj profetaĵoj ĉiutage cirkulas al ĉiuj homoj. La homoj atendas ankaŭ la publikigon de la tria mesaĝo de Fatima, kiu supozeble devus eldiri ion pri tio, kion ĉiu devas atendi en la estonteco.

La homoj troviĝas en mondotimo kaj depresioj, la malsanoj kreskas videble ĉe junuloj kaj maljunuloj. Senlireco kaptas la homojn en ilia strebado al la vivo. La senco de la vivo ne plu estas trovebla. Malsane, mal-

fortigite kaj senespere la vivo evoluas en la plej ofte belega vesto de la materie vidata bonstato. La animo kaj la korpo krias je helpo kaj saniĝo. Kiu tie povas helpi kaj sanigi, kie ekzistas elirejo?

Tie ekzistas nur unu respondo: Rigardu al tiu, kiu en Herford kaj ĉe la Traberhof apud Rosenheim tiam en la jaro 1949 donis respondon al la sama demando okazigante saniĝojn per maniero neklarigebla. Per tiu ago la homoj spertis en si mem ŝanĝiĝon kaj ekkonis la sencon de la vivo.

Li, Bruno Gröning, kapablis rigardi en la pasintecon, estantecon kaj estontecon, pro tio li povis helpi al ĉiu homo tiel, ke vere estis helpita al li. La helposerĉantoj, la saniĝoserĉantoj denove fariĝis gajaj, vivojesantaj, sanaj homoj, kiuj tiam sciis, al kiu ili devas servi, ne plu al la malbono, sed al la bono. Kaj per tio ili spertis, ke la bono estas pli forta ol la malbono.

Ĉar Bruno Gröning denove ligis ilin al la ĉiopotenca vivoforto, la saniga kurento, kiu ne konas nesanigeblon kaj neeblon, kiu ĉiam estas sendata el la Dia fortofonto kaj kiun ni homoj nur devas akcepti, tion ili nun scias, kaj ili ne plu timas, ke la malbono - per kiu ajn - povas superforti ilin.

Nun la vorto de Bruno Gröning fariĝis pli aktuala por ĉiuj homoj:

“Mi vivas, por ke la homaro vivu plu.”

“Ĉiu fariĝos sia propra kuracisto.”

“Kredu kaj fidu, helpas, sanigas la Dia forto!”

“Amu la vivon - Dion!”

“Dio estas ĉie.”

“Mono estas potenco, sano estas ĉiopotenco.”

“Mi estas nenio, Di-Sinjoro estas ĉio.”

“Ĉiu saniĝinto kapablas transdoni la saniĝon.”

Ĉar ĝis ĉi tiu jaro pasis 25 jaroj, ke Bruno Gröning ne plu vivas inter ni kiel homo kaj ni tamen spertas, ke plue okazas ĉiaj helpoj kaj saniĝoj, se ni konstruas sur lia vorto, kaj per tio komenciĝas flui la saniga kurento en la korpo, tial ni amikoj scias, ke en ĉia senespera situacio povas okazi la helpo, kaj pro tio ĉi tiu libreto estu malgranda komenco por la helposerĉantoj.

Infana kaj junula tempo

Dancigo estis la hejmurbo de Bruno Gröning. Dancigo, urbo kun 700jara fiera, riĉa germana pasinteco restis ĝis ĝia detruigo kaj transpreno fare de la poloj la grundo, de kiu Bruno Gröning prenis siajn impresojn por sia animo en sia infana, junula kaj en sia frua vira aĝo.

Dancigo jam estis nomita la lando ĉe la "Danciga Golfo" fare de la Gotoj, kiuj loĝis tie ĉe la bordo de la balta maro kaj multajn jarcentojn en la Vistula regiono. Kie la Motlavo disiĝas de la Vistulo poste troviĝis la Kastelo de la pomera princo de la danciga lando. Plurajn jarcentojn poste enmigris germanoj kaj fariĝis la unuaj germanaj distanckomercistoj. La unua germana bazara loĝejaro estas pruvebla en la jaro 1224. Dancigo fariĝis respekta Hanso-urbo kaj komenciĝis flori. Tiam ĝi estis transprenita de la germana kavalira ordeno, spertis multajn pacajn jarojn kaj poste maltrankvilajn jarojn. Dancigo fariĝis aŭtonoma, poste ĉefurbo de okcidenta Prusujo, fine "Libera urbo" post la unua Mondmilito. Tio certe estis la plej malfacila politika kaj ekonomia tempo, kiun tiu urbo devis sperti ĝis sia fino.

Tiun sorton spertis Dancigo, ĉar la geografia situo ĉe golfo de balta maro kaj ĉe la enfluejo de la Vistulo estis tre favora por gvida rolo en la regiono de la balta maro. La situo inter du grandaj popoloj, la germanoj kaj la slavoj, donis la tragikon en la sorto.

La beleco de la pejzaĝo ĉe la maro kaj de la maltalta riverregiono efikis al la homoj kaj lasis ilin konstrui belan, riĉan kaj fortan urbon. Diligento, kredo kaj forto estis la elementoj de la danciganoj. Ili konstruis siajn imponajn, belajn konstruaĵojn kiel la preĝejon de Sankta

Maria, la grandan halon en la korto de Arturo, la urbodomon, la arsenalon, la ŝipkonstruejon kaj la faman grupoportegon ĉe la Motlavo.

Ofte Dancigo signifis en ĉiuj germanaj landoj oazo de la paco, pro tio ĝi fariĝis fuĝoregiono por artistoj kaj kleruloj. La kontribuo de Dancigo al la literaturo kaj al la teatro signifis historian unikan sukceson.

Dancigo portas en la urboblazono sur sangoruĝa fono du blankajn krucojn kaj oran kronon.

Pri Dancigo-Oliva ni scias, ke tie estis fondita Cistercia Monaĥejo ĉirkaŭ la jaro 1170.

Kaj en tiu Dancigo-Oliva, antaŭurbo de Dancigo, en la proksimo de la maro kaj de grandaj arbaroj, vivis la familio Gröning. Ni lasu raporti Bruno Gröning mem pri sia infaneco kaj juneco! Ni prenas tre valoran skribaĵon, kiu restis savita en la arkivo.

La poemo de Martin Damb supozigas la esencon de Dancigo:

Martin Damb:

Grua pordego de Dancigo

El brikoj kaj ligno roka pordego,
lulilo de ŝipoj kaj pesilo de ŝarĝoj,
fortega nuko, en servanta fiereco,
tolereme klinita super ferdekoj kaj mastoj.

Turkapo, ramita en la fajran lumon,
la frunto ombrita, kaske tegmentita
ŝultre klinita per la ĉeno de devo,
per brilo de astroj ĉiele lumita.

Blazono de forto el kverko kaj ŝtono,
Surtera estaĵa simbolo kiel signo:
tolerante kaj portante la ŝarĝojn
servante al ĉio - kaj same al neniuj.



"Biografio,

Mi, Bruno Gröning, vivante en Plochingen (Neckar), Stumpenhof, Im Dornendreher 117, naskiĝis kiel 4a el 7 gefratoj de geedzoj Aŭgust Gröning kaj Margarethe je la 31a de majo 1906 en Dancigo-Oliva. Mia patro estis ĉefmasonisto. Ambaŭ gepatroj mortis; mia patrino en la jaro 1939, mia patro en la jaro 1949.

Dum miaj infanaj kaj junulaj jaroj, kiujn mi spertis en mia gepatra domo, mi pli kaj pli rimarkis eksterordinarajn kapablojn, kiuj - venante de mi - estis sukcesaj, doni trankviligan aŭ sanigan efikon al homoj kaj bestoj.

Jam kiel malgranda infano liberiĝis malsanaj homoj de siaj suferoj dum mia ĉeestado, kaj infanoj kaj plenkreskuloj ĉe ekscito aŭ kverelo tute trankviliĝis post kelkaj vortoj de mi. Ankaŭ kiel infano mi povis konstati, ke bestoj, kiuj estis konsiderataj timemaj aŭ malicaj, montriĝis kontraŭ mi bonaj kaj pacemaj. Pro tio mia rilato al la gepatra domo estis eksterordinara kaj streĉita. Baldaŭ mi strebis al tuta memstareco, por forlasi la ĉirkaŭaĵon de la "nekomprene" de mia familio.

Mi vizitis la bazan lernejon. Forlasinte ĝin, mi komencis komercistan studadon. Mi faris ĝin du jarojn kaj duonan. Tiun studadon mi devis ĉesi, pro la postulo de mia patro, ĉar estis lia deziro, ke mi lernu la konstrumetion. Mi sekvis la deziron de mia patro kaj studis la profesion de ĉarpentisto. Sed ne eblis fari la finon per ekzameno, ĉar je la tiama tempo en Dancigo estis granda senlaboreco. Pro tio mi devis rezigni sen fina ekzameno kvaronan jaron antaŭ la fino de mia studado, ĉar la firmao, ĉe kiu mi studis, devis fermi pro manko de mendoj."

Familio, laboro, militkaptiteco kaj hejmraveno

Bruno Gröning skribas en sia biografio:

"En la jaro 1925 mi sukcesis malfermi konstruligno- kaj meblofarejon kaj memstariĝi. Post preskaŭ du jaroj mi ĉesigis ĉi tiun laboron kaj eklaboris kiel fabrika kaj laŭokaza laboristo ĝis la jaro 1943. Mi laboris en ĉokoladofabrikato, ĉe la poŝtoŝtationo en Dancigo, ankaŭ kiel telegramportisto ĉirkaŭ 9 monatojn kaj ĉe la firmao Siemens kaj Halske kiel muntisto pri malforta kurento. Tie mi faris la plej multajn laborojn memstare. Ĉi ĉiujn laborojn mi faris kun intereso, kaj antaŭ ĉio mi intencis fari staĝon, dum kiu mi povis studi la scion kaj kapablon de la homoj en ĉiuj vivsituaĵoj kaj de ĉiuj popoltavoloj, kaj mi eksciis, kiel la homoj formas sian vivon. Mi ne nur serĉis la plej povrajn el la povruloj, sed ankaŭ la plej riĉajn el la riĉuloj por ekscii, kiel ili vivas. Privata vivo kiel oni komprenas ĝin en la kutima senco (kinejo-vizitadoj, estadoj en trinĉejoj, kartludado ktp. ktp.) ne interesis min.

En aĝo de 21 jaroj mi geedziĝis kun Gertrud Cohn el Dancigo. En tiu geedzeco naskiĝis du infanoj, kiuj intertempe mortis.

Jam tre frue montriĝis ĉe mi eksterordinara kapablo, efiki trankviligante kaj sanigante al homoj kaj bestoj, same kiel tio ofte estas ĉe kelkaj homoj ekde la praaj epokoj. Ĉi tiu efiko estis ĉe tiurilate inklinitaj personoj tiom forta, ke plene saniĝis aŭ ege pliboniĝis psikaj kaj korpoj perturboj, kiuj per aliaj sanigaj metodoj ne plu estis influeblaj.

En 1943, en aĝo de 37 jaroj, mi estis rekrutita en la armeon. Pro mia konvinko okazis konfliktoj. Ekzemple

oni minacis min per tribunalo pri militaj aferoj, ĉar mi diris: 'Ĉu vi metas min al la fronto aŭ ne, mi ne mortpafos homon.' Sed fine mi tamen venis al la fronto.

En 1944 mi estis vundita per grenadero je la dekstra femuro. Pro tio mi venis en hejmmregionan soldathospitalon, sed kiel nesaniĝinto mi denove estis metita sur germana grundo en la batalon kontraŭ la rusoj, kaj en marto 1945 mi venis en rusan militkaptitecon. En decembro 1945 mi estis liberigita el la rusa militkaptiteco al okcidenta Germanio.

En la rusaj militkaptitejoj mi ĉiumaniere pledis por la kaptitaj kamaradoj, pro kio mi trifoje estis gvidata al la komandantejo por pridemandado; en unu kazo mi estis minacita kun mortpafo. Inter alie mi postulis ankaŭ, ke niaj germanaj kaptitoj estu traktataj almenaŭ kiel la brutaro, ĉar la traktado de la kaptitoj tiam estis ege pli malbona ol tiu de la brutaro. Ankaŭ tiukaze mi estis denove favorita, ebligi helpon kaj mildigon al malsanaj kamaradoj en ŝajne senespera stato.

Post mia liberiĝo el la militkaptiteco en la jaro 1945 mi prenis loĝejon en la urbo Dillenburg kaj venigis al mi mian edzinon, kiu estis trovinta lokon en Hlesvigo kiel fuĝinto. Por lukri nian vivtenon mi akceptis ĉiun laboron, kiu en la postmilita tempo estis ofertita al mi.

En okcidenta Germanio kune kun rifuĝintoj el Sudetlando mi fondis la 'Helposocion de la forpelitoj'. Krome mi apartenis al la loĝejo-komisiono, ĉar mi denove sentis kiel mian taskon, helpi al la homoj.

1949 - urbo Herford

Bruno Gröning skribas pri ĉi tiu tempo en sia biografio:

"En marto 1949 virino, konatiĝinte kun mi, gvidis min al la familio Hülsmann en Herford. Mi helpu la filon Hülsmann. Tio okazis. Pro tio sinjoro Hülsmann faris grandan propagandon kaj pro tio en kaj ĉirkaŭ la domo de la familio Hülsmann okazis granda kolektiĝo de homoj. Okazis multaj saniĝoj, eĉ spontanaj saniĝoj. Unue mi kontaktis la instituciojn pri sano kun la deziro, okazigi kunlaboron kun la kuracistoj. De la komenco mi volis eviti ĉiujn malagrablojn. Sed la institucioj malakceptis, male, al mi estis donita skriba malpermeso por sanigado. La saniĝoserĉantoj, kiuj kolektiĝis ĉirkaŭ la domo Hülsmann, organizis demonstracion dum mia foresto kaj sturmis la urbodomon. Pro tio la urbestro sentis sin devigita, vokigi min kaj permesi al mi almenaŭ kvin plurajn tagojn por sanigadoj.

Mi veturis ankaŭ al Hamburgo, Hlesvigo-Holstinio ktp., al kuracistoj, kiuj invitis min, por tiuokaze helpi al malsanuloj. En Hamburgo okazis, ke mi ricevis de la tiea superurbestro parolmalpermeson, ĉar la hamburganoj ĉion preparis por ebligi al mi, paroli antaŭ miloj da helposerĉantoj."

D-ro fil. Kaul en 1949 en Herford estis unu el la ĉeestantaj raportistoj. La okazaĵo, kion li vidis tie, profunde impresis lin. Jen sekvas eltiro el lia broŝuro "La miraklo de Herford":

"La tuta mizerego de la homaro tuŝas min!

La malsanuloj kaj kadukuloj venas milope en la malgrandan vestfalian urbon, kiu inter siaj muroj havas la

miraklodoktoron. Per aŭtobusoj, ŝarĝaŭtoj, personaŭtoj, per fervojo, per ĉevalĉaroj kaj bicikloj, sur kradĉaretoj, en veturseĝoj kaj en malsanulaŭtoj, tage kaj nokte venas homamasoj al Herford sur la Wilhelmplacon, malsupre de la protestanta preĝejo, al la domo n-ro 7, en kiu Bruno Gröning trovis restadejon ĉe la gepatroj de infano sanigita de li. La homa mizero, kiu evidentiĝas ĉi tie, estas skuiga kaj senlima. En la ĉirkaŭaj ĝardenoj kaj en la parkoj sidas malsanuloj, staras kuŝseĝoj, brankardoj, tage kaj nokte la alvenintoj atendas sian saniĝon.

En la nokto al la 17a de junio 1949 la polico volis enbarakigi proksimume 50 patrinojn kun ege malgrandaj infanoj; sed ne helpis persvado, ili ne cedis kaj ne formoviĝis de sia loko, kaj ankaŭ la ekpluvo ne instigis la homojn foriri. Homoj el ĉiuj regionoj de Germanio amasiĝis ĉi tie, kaj senesperuloj kaj perturbitoj, junuloj kaj maljunuloj, virinoj, knabinoj, infanoj, el ĉiuj sociaj pozicioj kaj tavoloj, usonanoj, angloj, belgoj, svisoj, hungaroj, poloj, eĉ ciganoj, kiuj post la okazinta saniĝo de muta ciganinfano amase venas ĉi tien. Lamuloj, blinduloj, mutuloj, komunumo de mizero. Kompatindaj homoj, ĉu sidante en luksaj aŭtoj aŭ pene sin movante per lambastonoj. Esperantoj kaj senesperuloj, laculoj kaj turmentitoj, cent- kaj miloble estas la sola deziro: ricevi saniĝon! Neniu el ili demandas, ĉu tio, kio okazas ĉi tie, portas la akceptan registraĵon de oficejo, institucio aŭ ministerio, ĉu la scienco estas por aŭ kontraŭ tio, ĉu tiu, kiu sanigu ilin, estas mesio aŭ erudito, ili volas liberigi de sia homa turmento, ili volas refariĝi ĝoje agemaj homoj, ili volas resaniĝi.

Inter tiu homa mizero kaj la konflikto pri Bruno Gröning estiĝas abismo de homa malperfekteco. Anoncas sin la dubantoj, la skeptikuloj, la sensacioŝatantoj, la konku-

rantoj, la envianto, la fiparolantoj, vantaj fanfaronuloj, la orgojluloj kaj la arogantuloj. Ili ĉiuj opinias, ke ili devas diri ion pri tio, anstataŭi la juĝecon kaj la leĝon, protekti la publikan ordon kaj sekurecon. Pro tiu mizero kaj pro la skua eldiro de tiu bildo, ĉiuj pli bone silentu kaj vidu kaj mute deturniĝu. Se homo, kiu kuŝis 20 jarojn paralize en seĝo, vivanta kadavro, subite leviĝas kaj malsekure paŝas, tiam okazis io eksterordinara, kio estas ekster la ĉiutagaj aferoj. Por li kaj por ni okazis miraklo, kiu ne estas klarigebla, eĉ se oni kun multe da scio analizas kaj baziĝas sur tio, ke ne estas ekzakte science pruvite, ke Gröning sanigis verajn kaj ne imagitajn malsanojn. Ĉu la 70jara sinjorino Klimphove el Ennigerloh i. W, Ostfelderstr. 123, kiu estis paralizita sep jarojn, estis "image" aŭ "vere" malsana, tion decidu la kuracistoj, kiuj ĝis nun kuracis ŝin sensukcese. La fakto, kiun mi atestas, ke tiu maljuna virino sen fremda helpo leviĝis de sia seĝo kaj libere movis siajn brakojn la 16an de junio 1949 je la 14a horo post tutaj sep jaroj. Por mi tio apartenas al tiuj "mirakloj", kiuj kuŝas trans la mallarĝaj ekkonoj de la homa intelekto, al kiuj ni ne povas penetri kalkulante aŭ prikalkulante."

La helpitaj homoj sincere dankis al sia helpanto. La sukcesraportoj kaj la dankleteroj el tiu tempo estas skuiĝaj dokumentoj de la homa suferado kaj pri la posta feliĉo kaj dankemo. Kiam d-ro Kaul kun granda komprenemo prezentas al ni la okazaĵon en Herford el la jaro 1949 kaj revigliĝas la kredon de la helposerĉantoj antaŭ niaj okuloj, tiam des pli la sukcesraportoj el la tempo de Herford estas grandaj atestiloj de la kredo de la homoj. La sekvan raporton Bruno Gröning ricevis de viro, kies edzino estis liberigita de la malbono.

Leopold Steffan, eksfabrikdirektoro

Bad Salzuflen i. L., Untere Mühlenstr. 16

5.7.1949

Sukcesraporto

Tre estimata sinjoro Gröning!

Mi konsideras kiel mian devon kaj ŝuldon, elkore kaj sincere diri 'Dio rekompencu' al vi, kara sinjoro Gröning, pro la saniĝo de mia edzino Hilda Steffan, Bad Salzuflen, Untere Mühlenstrasse 16: "Laŭ la ekzistantaj atestiloj ekde 1942: neŭralgiaj perturboj dum misformiga artrozo, misformiga spondilozo, ĝeneralaj perturboj de la sango-cirkulado, muskola reŭmatismo, spirmanko sekve de kormalsano."

Mia edzino same kiel mia filino Luitgard (nask. 1930-05-01 en Böhm. Kamnitz, Sudetlando) multajn jarojn konsultis prof. d-ron Max Hochrein, la direktoron de la universitata kliniko en Lejpcigo, kie ŝi akiris mildiĝon, sed ne saniĝon. La zorgo pri mia sorto, - multajn jarojn mi estis persekutita de la nazioj, ĉar mi preferis la kristan ideologion ol la nacistocialisma kaj ĉe konvena ebleco mi estis arestita kaj kondamnita de speciala tribunalo al 14monata kaptiteco -, la malhumaneco de la forpelado el la hejmlando kaj malproprigo kun iliaj same malhumanaj, akompanaj sekvoj, la nun plurjara senlaboreco kaj ne prikulpita mizero, ege malplibonigis ne nur la difektaĵojn de mia edzino, sed antaŭ ĉio ankaŭ de mia filino. Tiurilate indas mencii la eksterordinare maloftan kaj pro tio ege laŭdindan kazon, ke la ĉi-loka fakkuracisto pri nervo-malsanoj d-ro Spernau, same persekutito de la nazia reĝimo, konsiderante nian mizeron ekde prin-tempo 1945 faris la kuracadon senpage ankaŭ ĉe mi (Armplexius-neŭrito, malforto-statoj). Ankaŭ li rezultis-

gis nur mildigon, sed ne saniĝon, kio estas pruvebla.

Plene de fido al via forto donita en vin de nia Di-Sinjoro la 1an de junio 1949 posttagmeze ni stariĝis en la ĝardeno de la domo Wilhelmsplatz 7 en Herford inter la granda homamaso, kiu petis de vi saniĝon. Nia seniluziigo kaj amariĝo estis senlima, kiam ni devis aŭdi, ke kaŭze de nesaniĝebla malsanulino suferinta multajn jarojn, sed tute neklare kaj tre malkriste ŝajnanta 'dekreto de ofici-stoj de la popolo', ne licis al vi sanigi.

Sed ke la kredo povas transloki montojn. Tion pravas, ke saniĝis, plene saniĝis mia edzino, kiun vi neniam vidis aŭ alparolis. Jam kiam mia edzino staris en la homamaso, ŝiaj manoj ŝvelis kaj ŝiaj fingroj konvulsiis. Ŝi ricevis fortajn postkraniajn dolorojn. Tuj post la reveno de Herford ŝi devis enlitiĝi pro doloroj ĉe ĉiuj korpopartoj, tro granda laceco same kiel mia filino, ĉe kiu krome aperis brulado en la okuloj kaj en la tuta okulregiono. En la nokto de la 1a al la 2a de junio 1949 mia edzino preskaŭ ne povis dormi, kiam mia filino spertis unu el siaj plej trankvilaj noktoj ekde multaj jaroj. Pro la doloroj mia edzino ne sciis, kien kaj kiel ŝi metu la kapon, piedojn kaj brakojn. Multajn jarojn mia edzino suferis teruran premon en la nuko tiranta al la postkranio, en ambaŭ ŝultroj kaj en la maldekstra kokso. Jam en la ĝardeno de la domo Wilhelmsplatz 7, je tiu tempo, kiam vi parolis al la malsanula amaso, ŝi malhavis ĝin. La doloro restinta en la menciitaj lokoj same estis malaperinta en la frua mateno de la 2a de junio 1949. Jam la 2an de junio 1949 mia edzino ne plu havis perturbojn dum la tago - en la nokto de la 2a al la 3a de junio 1949 ŝi tamen havis eltenblajn dolorojn, kiuj lasis ŝin ekdormi. Ekde vendredo, la 3a de junio 1949, mia edzino estas tute sana, sen doloroj kaj perturboj. Ankaŭ la mallongspireco plene mala-

peris, mia edzino povas normale profunde spiri sen iu ajn perturbo, eĉ portante ŝarĝon, suprenirante ŝtuparon, kion ŝi plurajn jarojn ne povis.

La suferoj de mia filino laŭ la ekzistantaj atestoj: hormona insuficienco, kramfatakoj, ĉe kiuj ludis grandan rolon krom nervozaj perturboj, kiuj rilatas al la evoluo, ankaŭ misharmonio de la glandoj; nervoza palpebrumado per la okulharoj; nedaŭre aperanta ĉeso de la parolado, kiu estis atestita kiel tre grava laŭ la plej nova atestilo de la ĉi-loka fakkuracisto, nun jam videble pliboniĝis post kiam la infano jam trifoje estis en via proksimeco. Pro tio ni gepatroj ne plu vivas en la plurjara zorgo, ke savaŭto portos hejmen nian infanon sangantan.

Neniu, nek persono aŭ ŝtata instanco, nek la tiel nomata malpermeso povas haltigi nin, kredi je la saniga forto donita al vi de Di-Sinjoro kaj atingi vian proksimecon. Kaj ni petas vin redoni al nia infano la sanon. Ni estas ege firme konvinkitaj, ke vi per la helpo de Dio sukcesos, kion la kuracistoj dum 9 jaroj, por ni kiel gepatroj tre zorgoplenaj jaroj, ne ebligis per la helpo de bona volo kaj kemiaj medikamentoj.

Ni denove diras al vi, kara sinjoro Gröning, 'Dio rekom-pencu vin'. La ĉiopotenculo fortigu vin en via suferplena batalo kontraŭ la malbono kaj tenadu vin ege longe por la suferanta homaro! Ni pensas pri vi en niaj preĝoj. - Kun afablaj salutoj kaj dankego ni estas viaj - dankemaj

(subskriboj) Leopold Steffan,
Hilda Steffan, Luitgard Steffan

Bruno Gröning helpas al la suferanta homaro



"Kiu spertis la feliĉon, rricevi sian sanon
pere de mi, tiu ĉiam danku al
DIO
el la plej profunda koro,
mi estas nur Lia ilo kaj servanto."

Kion la okazaĵo de Herford antaŭ dudek kvin jaroj signifas hodiaŭ por la amikoj de Bruno Gröning

Herford estu por ni tio, kio estas por homo la plej sankta. Tie Dio sin revelaciis al la homoj, por montri al ili, kiom granda Li estas, kaj kion Li volas. Li volas doni al la homoj la eblecon, denove trovi al Li mem, en la nuntempo, en nia hejmlando. Kaj tio okazis per la misio de Bruno Gröning.

Helpe de Bruno Gröning ni povas ekkoni la volon de nia ĉiela Patro, laŭ kiu la homo estu bela, bona kaj sana. Tial li okazigis en Herford, ke redempton de la malbono trovis homoj, kiuj falis en mizeron kaj dolorajn turmentojn. Tio okazis publike. Antaŭ la okuloj de ĉiuj homoj aperis bibliaj scenoj, kaj la mondo aŭskultis kaj por momento ĉesis spiri.

Ni amikoj de Bruno Gröning konsciiĝas, ke estas nia devo, sciigi tiun okazaĵon de Herford al la homoj de hodiaŭ kaj morgaŭ tiel, ke ankaŭ ili povu sperti tion, kiel ni estis favoritaj, sperti tion ĉe ni en la tempo poste. Tion la homaro ĉiam nomos miraklo, ĉar ĝi ne povas kompreni tion, kion Bruno Gröning klarigis al ni: “Ne estas miraklo, nur reaperas la Dia ordo en la homoj.” Tiu okazaĵo ne plu ĉesas por homo, kiu ne plu lasas sin fortiri de la Dia vojo, kiun Bruno Gröning malfermis al ni. Tiu okazaĵo estas Dia, kaj nun la homo de la nuntempo ricevis la eblecon disiĝi de la suferiga vojo kaj aliĝi ĉi tie, por ekpaŝi sur la Dian vojon kaj por plupaŝi sur ĝi.

Ke ni kun arda koro memoras pri tiu tempo kun granda dankemo al nia Kreinto kaj al Lia servanto Bruno Gröning, nun post 25 jaroj estas deziro por ni. Ni ekko-

nas tiun lumon, kiu tiumaniere venis en la mondon kaj ni konsterniĝas, kiel la mallumo sur ĉi tiu mondo opiniis esti potenca, volante malpermesi ĉi tiun okazaĵon. Hodiaŭ ni scias, ke Bruno Gröning jam siatempe sciis: "Tion oni ne povas malpermesi, tamen okazas, kio devas okazi."

Ni estas konvinkitaj, ke tiu flamo de la altruismo de Herford estonte ne plu estos haltigata, sed ke la altruismo inter la homoj fariĝos devo kaj memkompreneblo, kiel pruvis tion la 25 jaroj. Servanta altruismo, tion Bruno Gröning kiel servanto de Dio demonstris al ni per sia vivado, kaj invitis nin, meti nin je dispono de Dio kiel ilon, ne konsolante niajn proksimulojn per malplenaj vortoj, sed ke ni nun vere agante peru la helpon. Tio estas por ni la heredaĵo de Herford.

Kion Bruno Gröning sciigis al ni jam en Herford?

“Fidu kaj kredu, helpas, sanigas la Dia forto!”

“Dio estas la plej potenca kuracisto.”

“Ju pli granda la sufero, des pli longa la reguliĝo.”

“La bono en la homo devas forigi la malbonon.”

“Laŭ sia ago li estas pesata, kaj se li ne estas tro malpeza, tiam restas la espero al la savo.”

“Forĵetu de vi vian suferon!”

“Vi ricevis helpon, ĉar vi kredis.”

“Homajn ordonojn mi ne sekvas. Mi solvis aferojn, pri kiuj vi diras, ke ili estus mirakloj, sed ne estas mirakloj, estas memkomprenebla-ĵoj.”

“Homo ne povas kaŭzi miraklojn, kaj neniuj homo kapablos fari tion, kion vi vidas ĉi tie.”

“Ne estas tiel, ke mi devas helpi al ĉiuj homoj. Mi scias, ke 10 el 100 personoj ne reagis. Kiu mokas pri Di-Sinjoro kaj ne havas la kredon, tiun oni ne povas helpi.”

“Ĉiuj homoj, sendepende de nacio, raso aŭ religio, indas, ke ili ricevu helpon.”

”Ni ĉiuj estas infanoj de Dio kaj havas nur unu Patron, kaj tiu estas Dio. Sole li povas helpi al ni el la mizero, kiun ni devas porti.”

”Laŭ Lia volo ĉio okazos, ankaŭ se mi ne ĉeestas.”

”Kvankam mi restis malriĉa, tamen mi estas la plej feliĉa homo sur la tero, ĉar mi povas helpi.”

”Ion mi ne volas havi: Dankon! Danku al via Di-Sinjoro, estas sole Li, kiu sukcesigas.”

”Mia vivo apartenas al ĉiuj homoj, kaj pro tio ĉiu minuto kaj sekundo estas valora.”

”Estu malpli da vortoj, sed des pli grandaj agoj.”

Bruno Gröning kaj la kuracista scienco en Heidelberg

Ni aŭskultu al Bruno Gröning mem!

“Pri - Ekzameno de Heidelberg 1949 -

Konciza raporto, en kiu estas menciita nur la plej grava parto.

En junio 1949 la ŝtata flanko senrajte transdonis al mi skriban malpermeson pri sanigado. Ĉi tio estis sen rajto pro tio, ĉar ne mi, sed ĝi sanigis. Miaj klarigaj vortoj, kiujn mi parolis al la amasitaj helposerĉantoj, estis de tiel granda konvinka forto, ke okazis saniĝoj ĉe multaj ĉeestantoj, t. e. la helposerĉantoj, kiuj jam estis deklari-taj nesaniĝeblaj de kuracistoj. Ĉi tio frapis la atenton ankaŭ de tre multaj homoj. Ankaŭ sinjoro profesoro F., nuntempe loĝanta en Marburg, (ligite kun la revuo “Revue”) estis tiom forte impresita, ke li jam esploris ĉe saniĝintoj kaj tiam konstatis, ke fakte okazis saniĝoj. Tiel la intereso ĉiam pli evoluis kaj sekve okazis, ke sur-loke oni faris enketojn, kiuj same pruvis la sukceson. Tiutempe mi mem ne estis en Herford, sed en norda Germanio. Sinjoro profesoro F. mobilizis ĉion en Herford, por ke mi, en norda Germanio, ricevis la mesaĝon, ke mi tuj venu al Herford, ĉar certa profesoro F. kaj aliaj sinjoroj atendis min kun plej granda intereso, ĉar ili intencis liberigi al mi la vojon por libera ago. Mi sekvis ĉi tiun peton. En Herford mi interparolis kun sinjoro profesoro F., post kio flanke de li en kunlaboro kun sinjoro profesoro W. kaj en ties kliniko en Heidelberg estis promesita al mi ĉiu subteno. Oni ne nur volis klo-podi ĉion, por liberigi la vojon por mi, sed eĉ la tuta kuracistaro interesiĝis pri mi mem kaj pri mia ago kaj

jam pro tio oni volis atingi kunlaboron por ĉiuj tempoj. La sinjoroj interesiĝis tiom forte pro tio, ĉar ili centprocente konvinkiĝis pri mia ago, kiel ili akcentis kaj antaŭ ĉio pro tio, ĉar oni devus utiligi mian agon por la tuta homaro. Estis interkonsentite, ke mi estu je la dispono de la menciitoj dek tagojn en la kliniko en Heidelberg; tio ankaŭ pro tio, por pruvi al la tuta kuracistaro, ke saniĝoj pere de la persono Bruno Gröning povus esti kontrolitaj kaj aprobitaj. Kelkajn tagojn poste mi eksciis, ke la magazino “Revue” volis financi ĉi tiun tutan entreprenon. Antaŭe mi ricevis je mia dispono trunkodomon proksime de Frankfurt/Main por kelkaj tagoj, por ke mi havu la eblecon por povi interne koncentriĝi por mia proksima tasko.”

La magazino “Revue” tiam raportis samtempe:

“Bruno Gröning antaŭ la kuracistoj de la Universitata Kliniko en Heidelberg... Kun d-ro W. ni interkonsentiĝas, ke la eksperimentoj komenciĝu la 27an de julio 1949. La pacientoj estu elektitaj el la rondo de tiuj malsanuloj, kiuj letere sin turnis al Bruno Gröning. Ekzistas ja 80.000 leteroj: leteroj de malsanuloj, kiuj havas ankorau nur unu esperon, ke Bruno Gröning povu sanigi ilin, kaj dankleteroj de homoj, kiujn Bruno Gröning kuracis. Ni deprenis ĉi tiujn alvenintajn 80.000 leterojn per ŝarĝaŭto de Herford.

Certa kvanto de plujaj pacientoj estu direktita el la Kliniko Ludolf Krehl por la kuracado. La 26an de julio Revue prunteprenas por Gröning kaj por liaj plej proksimaj ĉirkaŭuloj propran domon en Heidelberg, en kiu li praktiku. Matene de la 27a de julio Gröning forlasas la solecan arbaran domon en la Taŭnus-montaro kaj kelkajn horojn poste li bonfarte alvenas en Heidelberg per nia aŭto.

La magnetofona surbendigaĵo evitas erarojn. Ekde la eksperimentoj de Heidelberg la publiko ne plu dependas de pli aŭ malpli kontraŭdiraj eldiroj de atestantoj pri la kuracmetodoj de Gröning. La magnetaj sonbendoj plej precize registris la evoluon de la kuracadoj. La aŭdigo de eltiraĵoj el la sonbendoj ebligas pli konvinkan bildon ol tion faras longaj raportoj. Revue publikigas sur la sekvaj du paĝoj eltiraĵojn, kiuj kvazaŭ en drameca formo prezentas unu el la medicine plej interesaj sukcesoj de Gröning. La interkrampajn rimarkojn pri la reagoj de la pacientoj estis prenitaj el la samtempe stenografie faritaj protokoloj.

Bruno Gröning kuracas la morbon de Bechterew de Strobel. Eltiraĵo el la surbendigajo

Strobel: (Sentas subite dolorojn ambaŭflanke en la gluteaj ostoj.)

Gröning: Vi havas ankoraŭ dolorojn.

Strobel: Jes - sed ne plu tiel fortajn.

Gröning: Ili malrapide fortiriĝas. Fermu la okulojn kaj atentu! Kio nun okazis?

Strobel: La doloroj malpliĝis. Rigideco en la spino, mi opinias, ke ĝi rompiĝas.

Gröning: Malforta elektrizado, kiu moligas la vertebron.

Ekstaru, movu vin ĉe la lumbo - klinu vin de la kolo ĝis malsupre! (Strobel klinas sin ĝis la plafono.)

Gröning: Nun kavigu vian spinon malantaŭen!

Strobel: Malantaŭe doloras.

Gröning: La kapon malsupren - tiel kvazaŭ vi volas rigardi malsupren! La kapon dekstren, maldekstren - ĉiam plue! Rigardu supren kaj malsupren - supren kaj malsupren - dekstren kaj maldekstren!

Strobel: (Ofte faras tiujn movojn).

Gröning: Fleksu la dekstran dikfingron internen, kion vi sentas en la dikfingro? (Paŭzo).

Strobel: Malpeza sento.

Gröning: Kaj kion nun en la lumba regiono?

Strobel: Mi sentas nenion - tie malantaŭe estas trankvile.

Gröning: Nun denove sidiĝu! - Kio nun okazas en via korpo?

Strobel: Nun mi havas ege trankvilan senton.

Gröning: Sed kio nun okazas?

Strobel: Nuntempe mi nenion povus diri.

Gröning: Komenciĝante ĉe la pugo vi havas malfortan premon.

Strobel: Mi sentas nenion.

Gröning: Fermu la okulojn kaj observu vian korpon!

Strobel: La doloroj en la spino malaperis, mi sentas min pli freŝa.

Gröning: Kiel vi ĝis nun ekstaris?

Strobel: Tre malfacile - mi ja estis tute rigida.

Gröning: Iru kelkajn paŝojn.

Strobel: En la ingvena regiono mi havis dolorojn, ĉefe dum la irado supren sur ŝtuparoj. Mi ne povis veni supren, tre doloris, maldekstre pli ol dekstre.

Gröning: Provu supren iri la ŝtuparon!

Strobel: (Iras al la ŝtuparo, subite saltas surla ŝtuparo supren kaj malsupren. Li estas feliĉega.)

Gröning: Turnu vian kapon dekstren kaj maldekstren!

Strobel: Krakas, kvazaŭ tie malantaŭe estus sablo.

Gröning: Kiel estas nun?

Strobel: Estas pli malpeze.

Gröning: Ĉu la krakado ĉesis?

Strobel: Ne - ankoraŭ krakas!

Gröning: Metu vian manon tien - forprenu la manon!

Strobel: (Ankoraŭ movas la kapon).

Gröning: Tio malpliĝas.

Strobel: (Ankoraŭ ĉiam movas la kapon). Jes, tio funkcias bone. (Gröning okupiĝas pri aliaj pacientoj).

Strobel: Estas malpeze - mi ne plu havas dolorojn, ankaŭ ne plu en la glutea ostoj, ĉiuj doloroj malaperis.

Gröning: Denove petas s-ron Strobel supren iri la ŝtuparon.

Strobel: Denove facile saltas supren kaj malsupren.

La kazo Str., kiu en Heidelberg kaŭzis grandan sensacion kaj fariĝis unu el la dokumentoj por la unua eksperimento. Paciento: Str. el Mannheim-Neckarau. Jen la historio pri lia malsano: Str. estas koncize instruista laboristo en kablofabriko, naskiĝis je 1906-01-06, edzo ekde 1928, unu infano. Krom je pulmito li antaŭe neniam malsaniĝis. En la milito trifoje vundoj de grenaderoj ĉe la gamboj kaj ĉe la pugo, en 1944 granda akcidento. Ĝajnis, ke rompiĝis lia nuko. Sed pri tio oni ne parolis. En 1945 militkaptiteco, sed liberigite jam en aprilo de la sama jaro. En aŭgusto 1945 aperis perturboj dum la kolmovo, poste ingvenaj doloroj, fine iradoperturboj. Plena rigidiĝo de la spino, nekapable movi la kapon, fortaj doloroj dum la irado kaj la irado supren. Tipa kazo de morbo de Bechterew.

ĉe la komenco de la kuracado li ege suferas kaj nur kun granda peno venas en la konsultojn. Bildo 1: montras lin inter pluraj aliaj pacientoj. Bildo 2: Gröning igas Str. ekstari kaj levi la gambojn. Str. sen doloroj faras movojn, kiuj ĝis nun estis por li neeblaj. Bildo 3: Sen eksterordinaraj penoj Str. trunkokliniĝas antaŭen kaj poste malantaŭen. Bildo 4: Nun li supren kuras sen malfacilaĵoj la

ŝtuparon en la grandan vestiblon de la domo 'Rutenberg', liberigite de plurjara, korpa kaj anima turmento.

Postekzameno

Post la unua kuracado fare de Gröning la iradoperturboj plene malaperis. La paciento sentas sin bona.”

Tio estas malgranda eltiro el la magazino REVUE. Grave dirende estas, ke ĉi tie rilate Bruno Gröning estis uzitaj la fakesprimoj de la medicinistoj, ĉu konscie aŭ malkonscie, tion ni ne volas juĝi, kaj la magazino REVUE sciigis al la publiko: Gröning kuracas, la unua kuracado de Gröning, eksperimento de Gröning, sukcesoj de Gröning, medicine interesa sukceso ... paciento de Gröning. Estis ĉi tiuj esprimoj, kiuj poste estis interpretitaj al Bruno Gröning tiel, ke li estu punita pro tio. Kaj multajn jarojn Bruno Gröning sin defendis kontraŭ tio, kaj li pravis, ĉar li ne havis ian rilaton al kuracado de malsano. Li ne kuracis, antaŭ ĉio li ne eksperimentis, kaj la sukceson, kiu aperis pro lia agado, li ĉiam atribuis al Dio mem. ĉe lia lasta proceso li estis ŝargita per ĉi ĉio kaj oni ne kredis al lia vortoj, ke li tute ne havus rilaton al tio.

Ankaŭ ĉi tiu libro kontribuu al la preciza kaj unusignifa distingado de la esprimoj. Pro tio ankaŭ la rerigardo al la komencoj.

Kaj nun ni denove aŭdu Bruno Gröning mem pri la rezulto de ĉi tiu ekzamena laboro:

“La kuracista esplorado rezultis bone. Sciigis tion al mi sinjoro profesoro F. kaj ankaŭ sinjoro d-ro W., kiu (komisiite de profesoro W.) sin disponigis por ĉi tiu ekzameno. Kaŭze de ĉi tiu ekzamena rezulto estis firme prome-

site al mi, ke la vojo por mia plua, libera agado nun estas fine liberigota. Estu disponigotaj al mi sanigejoj, en kiuj ankaŭ kuracistoj laboru. Tio por plej precize kontroli ĉiujn kazojn, por ricevi pluajn konfirmojn ne nur en la publiko, sed ankaŭ en la medicino.

La financaj kondiĉoj tiurilate, prezentitaj al mi de sinjoro profesoro F., estis tiaj, ke ili estis por mi neakceptindaj. Nature pri tio okazis multaj preparoloj, ankaŭ kun sinjoroj, kiuj volis financi ĉi tiun verkon. Mi ne povis konsenti la proponojn de sinjoro profesoro F. kaj pro tio mi malakceptis ilin, ĉar mi

1^e, tute ne disponis pri iom da mono. Tial mi ne povis transpreni financajn devojn, kiujn mi ne povus plenumi.

2^e, mi neniam intencis fari el la tuta afero negocon.

Pro tio ĉi ĉio estis por mi neebla postulo. Krome mi volis fari nur tion, kio estis donita al mi per mia destino: helpi al la helposerĉantoj kaj pro tio min disponigi al la kuracistoj kaj psikoterapiistoj, sed neniam fari el la tuta afero negocon.

Post la tuta ekzamenado sinjoro F. promesis al mi, ke mi ricevu pozitivan ekspertizon de li kaj de sinjoro profesoro W. Tia ekspertizo neniam estis enmanigata al mi. Male oni ĉion interpretis malutila al mi.

Ankaŭ ĉi-kaze mi denove devis konstati, ke oni atribuas al la negoca flanko la plej grandan valoron. Kie estis la liberigo de la vojo, firme promesita por mi, por ke mi povu libere agi?

Por mia unua proceso en la jaro 1951 la prokuroraro postulis ekspertizon de la jam menciita kliniko en Heidelberg. Tiun ekspertizon la juĝejo ne povis uzi, ĉar la respondo al la demandoj de la juĝejo tute ne estis elti-

rebla el ĝi. Tiu ekspertizo denove donas al mi pruvon, ke por mi la negativa flanko estis sufiĉe granda, ĉar la intenco al negoca rilato ne okazis tiel, kiel la sinjoroj pensis. La ekspertizo estis farita ĉe kabineta tablo, en kiun oni plektis ĉion, ankaŭ negativan, kio kolektiĝis pri mi ĉe la juĝejo kaj kio ankoraŭ ne estis klarigita. Per ĉi tiu ekspertizo la tiel nomataj ekspertizistoj ne donis al si honoron, sed denove pruvon por tio, kiel homoj povas esti. Krome oni honoris nek la medicinon nek la psikoterapion. Kompreneble mi ne apartenas al tiuj homoj, kiuj kombas ĉiujn per la sama kombilo, sed mi rigardas ĉi tion kiel mankon kaj mi bone scias distingi ĉi-rilate.

Per la agmaniero de la supre menciitaj sinjoroj de la medicino kaj psikoterapio la gazetaro antaŭ ĉio nun havis eblecon, prilumi la ĉi tie disponitan materialon de la negativa flanko.”

La apero de Bruno Gröning en la publiko

En 1949 aperis libro pri nia helpema amiko kaj lia faro, kiu nenion perdis de sia vigleco post eĉ kvarona jarcento. La ĵurnalisto d-ro Kurt Trampler skribis la libron “La granda returno”. La sekvaj partoj estis prenitaj el lia libro.

“En 1949 estis preskaŭ neniuj okazaĵoj, kiu tiel forte trovis la scivolan atenton kaj la profundan internan kunsenton de la homoj kiel ĉiuj okazaĵoj ĉirkaŭ Bruno Gröning. La apero de ĉi tiu homo nepre ne estas klasifikebla en materiisman mondbildon. Tio verŝajne estas la profunda kaŭzo de la kelkfoje fanatika batalo de opinioj, kiu estiĝis ĉirkaŭ lia persono kaj liaj sanigoj: Kiu enfalis en la materiisman pensadon tiel forte, ke li kapablas kredi ankoraŭ nur tion, kion li povas tuŝi per la manoj aŭ mezuri kaj pruvi per aparatoj, tiu sen komprenemo kaj tre ofte eĉ netolereme rigardos ĉion nekompreneblan, kiu okazas helpe de la faro de Gröning. Sed kiu konservis en si la respekton kontraŭ tio, kio estas neesplorebla, Dia kaj ne respondumigas nur la racion por siaj lastaj vivodecidoj, tiu deziras esplori almenaŭ kun respondumema seriozeco, ĉu la saniga forto de Gröning fluas el tiuj ĉiamaj fontoj, kiuj kuŝas transe de nia pensado. Li krome pretos kredi fenomenojn, kiujn li precize observis, ankaŭ se mankas al li iuj ajn klarigoj el la kampo de la konato, esploro.

Tiamaniere la apero de Bruno Gröning - tute sendepende de tio, kiuj ekkonoj estos la lastaj pri li kaj lia verko - devigas al disiĝo de la spiritoj: inter tiuj, kiuj interne estas pretaj, ekkoni ankaŭ ion neesploreblan kiel vivan realecon, kaj tiuj, kiuj neas la kredon je tio.

La sento, ke la materiisma epoko evoluas al sia memde-truiĝo, en la mondo de hodiaŭ estas ĝenerala. Sed ankaŭ ĉi-rilate disiĝas la spiritoj inter tiuj, kiuj en obtuza forlasiteco flosas al la katastrofo aŭ, se ili apartenas al la potenculoj, ili esperas supervivi per certa rabobesta moralo, kaj la aliaj, kiuj meze en la granda kaoso estas neŝanceleble kredemaj, ke nova epoko de la vivado komenciĝas, ke ĉiu vivo en pli alta ordo denove fluas al harmonia ekvilibro kaj kuna ago. ĉar sennombraj homoj en la tuta mondo starigas al si ĉi tiun demandon kaj ĉar por ili la senco de la vivo estas ligita al la respondo - tial ne nur la okuloj de la helpobezonantaj malsanuloj sin direktas al Gröning. Ankaŭ la sanuloj demandas, ĉu liaj neklarigeblaj sanigoj aldoniĝas al la signoj, kiuj anoncas turnon de la epokoj. Jes, por multaj malsanuloj ĉi-lasto demando estas eĉ pli grava ol ilia propra saniĝo.



Bruno Gröning
vokas la homojn al la
GRANDA RETURNO

Traberhof apud Rosenheim

La TEDEUMO de Rosenheim

La kunveno de Gröning kun la nenombreblaj miloj da helposerĉantoj antaŭ la ĉevalbieno 'Traberhof' apud Rosenheim estis rezulto de drameca forto: La turno de la epokoj, ĉe kiu ni hodiaŭ staras, revelaciigis per simbola klareco.

La suferantoj, la forlasitoj, la batitoj de la sorto, kiuj kun la lasta espero je konsolo kaj saniĝo alamasigis, ili ĉiuj estis akuzantoj kontraŭ la epoko de la materiismo, kontraŭ kies mortiga malsukceso ili en sia amara mizero faris nekontesteban ateston. Batite de la milito per mil vundoj kaj suferoj, forpelite el la hejmregiono, lasite solaj en dubo kaj mizero ili venis al Gröning. Eble ne multaj el ili konsciiĝis, ke ili elpaŝis el, laŭ vera senco de la vorto, sensana epoko kaj transpaŝis sojlon de nova, kiu baziĝas sur firma kredo, ke ĉio viva estas harmonia, organa unueco kaj nedisigeble ligita al Dio. Sed en ĉi ĉiuj homoj sendube vivis la supozo, ke ili fuĝis el malvarma, senkora diomalproksimeco de la materiismo kaj kun la alvoko de la saniganto metis sian sorton samtempe al la korfavora boneco de Dio.

La apokalipsaj bildoj de la grandaj mezepokaj majstroj ŝajnis realiĝi, se oni akceptis en si la hororon, kiu kondukis tiujn homojn ĉi tien. Kiaj nekuraceblaj malsanoj kaj vundoj, anima detruigo kaj obtuza vivotimo timeme kaŝiĝis en la domoj pro apatia scivolemo - ĉi tie tio malindulge, neeviteble videbliĝis. Virinoj kaj infanoj kun palaj, senkarnaj vizaĝoj, en kiuj brulis turmentitaj okuloj, kiuj eĉ mallernis la ploradon; amputitoj kaj paralizuloj, ne plu kapablaj por propra movo; homoj, kiuj estis skuitaj de teruraj nervaj konvulsioj, kun ŝaŭmo antaŭ ties misformitaj vizaĝoj, aliaj, kiuj dum nehaltebla

plorado skuiĝis - tiel ili alvenis, tiel ili estis alportitaj: senfine miloj kaj miloj.

Kiaj vivo- kaj laborforto, kiaj feliĉo kaj espero iam estis en ili, tio kuŝis dispremita malantaŭ la dorndrato de la kaptitejoj, tio estis enterigita sur la ruinoj de detruitaj domoj, tio restis en la perdita hejmgregiono.

Dum tiuj tagoj kaj semajnoj mi trovis neniun, kiu ne estus plej tuŝita kaj skuita de ĉi tiu kvantego da sufero kaj mizero, kiun neniun iam povus imagi. Kiu ankoraŭ povis enrigardi la nemezureblan kvanton da petleteroj, en kiuj ĉiuj plendis sian mizeron, kiuj pro sanecaj aŭ pro ekonomiaj kaŭzoj tute ne havis la eblecon, ekveturi al Gröning, al tiu estis klare, ke la homoj, kiuj tie kapo ĉe kapo atendis multajn tagojn sian lastan esperon, kiuj estis nur la reprezentantoj de senfina amaso da malsanuloj, invalidoj kaj senesperuloj, kiuj estas ĉie, kie milito kaj ŝtata racio, malamo kaj malfido regas la sortojn de la popoloj. Certe, inter tiuj homoj estis ankaŭ multaj, kies malsanoj aperis ankaŭ en plej profunda paco. Sed la plej multaj el ĉi ĉiuj helposerĉantoj estis viktimoj de la scienco alte evoluinta homdetruado kaj de la apenaŭ plu eltenebla anima ŝarĝo de nia epoko. La plej multaj el ili kiel revenintoj kaj invalidoj, kiel bombitoj kaj fuĝintoj lace iris de oficejo al oficejo, antaŭ ol ili ricevis malabundan helpon, antaŭ ol ili ricevis loĝeblecon en plenplenaj barakoj aŭ loĝejoj. Antaŭ sennombraj oficejoj ili estis numeroj, sufiĉe ofte ili trovis tie grumblemajn aŭ apatiajn vizaĝojn, sed ne la varmecon de homa helpemo. Kaj ili eĉ tro ofte spertis, ke pli facile estis donite al la riĉulo, kiu mem povus doni, ol al la malriĉiĝinto, kiu havis nenion alian ol la ŝarĝon de sia mizero.

Tiuj homoj, kiuj atendis Gröning, ne plu apartenis al la ĉiokredantoj kaj entuziasmuloj. Plejparte ili estis spi-

rite eluzitaj, skeptikaj, apatiaj, sed tre akre aŭskultemaj por ĉio maljusta, por ĉiu frazaĵo, konvinkeblaj ankoraŭ nur per helpodona ago.

Estis la tagoj kaj noktoj antaŭ la granda amasa sanigo je la 9a de septembro 1949 - Bruno Gröning mem estis tiutempe survoje en norda Germanio - kiam inter la atendantoj okazis la unuaj telesaniĝoj. Sub la giganta impreso de tiaj eventoj malrapide okazis ŝanĝo en la rondo de la malsanuloj: Antaŭ iliaj okuloj efikis forto, por kiu ne ekzistas homa klarigeblo, kaj tiu forto helpis, kie ankoraŭ neniu homo povis helpi. Tiuj, kiuj vidis tion, ne estis kleruloj, kiuj provis analizi 'miraklon' kaj akordigi ĝin al iliaj konoj. Ili estis nur helpobezonantaj homoj, kiuj ĝis tiam nenie trovis homan helpon. Homoj, kiuj trapasis ĉiujn fazojn de sufero kaj ekzameno. Kaj tial en tiu ĉi momento ili estis maturaj, ricevi la saniĝon, ekkoni la manon de Dio, sperti la Dian forton, kiu donis al ili signon, kiu ellevis ilin el la tuta rigida mekanismo de la materiisma tempo. Ili, la plej mizeraj el la mizeruloj, estis en tiu horo riĉaj, ĉar ili spertis en siaj koroj ŝanĝon, kiu rifuziĝas al sana riĉulo dum lia tuta vivo.

Denove kuŝis la profunda malhelo de la nokto super la miloj da atendantoj. Tiam kelkaj komencis eldiri la eble delonge ne plu diritajn vortojn, ke ĉiam pli da homoj ekparolis la preĝon, ĝis ĉiuj kune parolis ĝin:

Patro nia, kiu estas en la ĉielo...

Kaj tiam eksonis celebre kaj serioze la Tedeumo.

En tiu kortuŝa horo okazis eble ankoraŭ pli granda miraklo ol la saniĝo de paralizaj membroj kaj de ruinigitaj nervoj:

Homoj retrovis la vojon al Dio.

La sekvan posttagmezon, kiam Bruno Gröning staris antaŭ la helposerĉantoj, li trovis ilin, kiel apenaŭ iam antaŭe, interne vekitaj, pretaj ricevi la saniĝon. Preskaŭ unu horon li silente staris antaŭ la preĝanta amaso, akceptante kaj prilaborante ilian suferon en si. Kiam li poste eldiris la vortojn de Dio, la Patro kaj la Kuracisto de ĉiuj homoj, tiam okazis vere bibliaj scenoj.

Malsanuloj leviĝis de la brankardoj, paralizitoj disiĝis de siaj lambastonoj kaj povis iri, blinda infano ekvidis. Krioj de danko ĉiam anoncis novajn saniĝojn, de kiuj ja nur parto povis esti videbla. Ankoraŭ longan tempon poste ĉiam denove anonciĝis saniĝoj, kiuj okazis aŭ komenciĝis dum tiuj tagoj.

De la teraso de la Traberhof unu el niaj plej bonaj kuracistoj fariĝis atestanto de ĉi tiu okazaĵo. Li konfesis profunde skuite, ke li prenas kiel frukton de ĉi tiu horo la kredon en la vivon, ke la homo estas nenio sen la beno de Dio, kaj ke neniu scio kaj neniu povo povas esti utila por la savo, se li ne humile montras sin inda por la graco.

Denove fariĝis malhele. Bruno Gröning, kiu plurtage estis survoje sen dormo, por mallonga tempo eksidis flanke, antaŭ ol li denove turnas sin al unuopaj gravaj kazoj. Kun gesto, kiu esprimas bonecon kaj korfavoron, li aŭskultis la voĉojn de tiuj, kiuj serĉis lian helpon.

En la tuta ĉambro ne aŭdeblas vorto. Ankoraŭ neniu povas elparoli la sentojn, kiuj nin ĉiuj tuŝas. De ekstere ni aŭdas, kiel respondon al la esperantaj, demandantaj pensoj:

Venu al ni Via regno."

Kiu ne volas aŭdi la vorton, tiu ne bezonas serĉi la helpon kaj saniĝon

Jam en 1949 doktoro Trampler tute ĝuste ekkonis, kia sekreto estas en la vorto de Bruno Gröning. Sed post 25 jaroj por ni amikoj de Bruno Gröning kaj por la amikoj en la tuta estonteco ĝi estas kaj estos la ŝlosilo por plua povo sperti la efikon de la Dia forto. Ni legas en lia 'Granda returno':

“Kiel ni konstatis, en la tuta kontraŭeco de la opinioj pri Bruno Gröning ĵurnalistoj, kuracistoj, natursciencistoj ĉiam denove provis akiri la sekreton de la forto de Gröning el sia kutima pensosfero pere de la esploroj de la konstatitaj saniĝoj. Strange, la plej proksima fonto de la sciigado estis uzita nur ege malofte:

La propraj vortoj de Gröning

Oni al kutimiĝis al la supraĵa maniero trakti liajn paroladojn kaj interparolojn kiel specon de akompanaj fenomenoj de liaj sanigoj, kiuj same rezulte povus foresti, kaj ne konsciiĝis, ke li donas pere de siaj vortoj al ili la solan ŝlosilon, kiu malfermas la aliron al la kompreno de tio, kiajn neklarigeblajn fenomenojn ni mirante spertas ĉirkaŭ li. Kelkaj malsanuloj, kiuj ĉe vizito de Gröning rimarkeble ricevis la sanigan kurenton, tamen ne akiris la saniĝon - laŭ mia firma konvinko nur pro tio, ĉar ili preterlasis konsciencie akcepti kaj konsideri la vortojn de la saniganto. La vorto, ĉiu unuopa sufiĉe grava, por pesi kaj serioze pripensi ĝin, ĉe la sanigoj de Gröning havas tian decidan, instigan signifon, ke oni povus diri preskaŭ: "Kiu ne volas aŭdi la vorton, tiu ne bezonas serĉi la helpon kaj saniĝon, ĉar la vorto estas la gvidanta, kondukanta forto por konservi la saniĝon en si. - 'Mi sciigas

al vi ...' - Kiam Gröning komencas per ĉi tiu frazo sciiĝon, tiam tio ne estas laŭkutima parolturno, sed ĉi tiu frazo signifas: Li nun sciigas al la aŭskultantoj la donacon, ion de la esenco de sia forto, kion ili ĝis tiam eble povis nur supozi.

Ni aŭskultu el unu de liaj paroloj (Traberhof, 27a de oktobro 1949 vespere), kion li mem diras pri siaj saniĝoj:

“Kiu ricevas kaj kiu havas rajton je saniĝo? Rajton havas nur tiu, kiu portas en si la Dian kredon kaj volas vivi kun ĝi. Plue ekzistas homoj, kiuj jam antaŭ jaroj perdis la kredon, metis jam antaŭ jaroj la kredon flanken kaj male tiris ĝin ankoraŭ tra malpuraĵo kaj koto. Mi sciigas al vi, ke vi ĉiuj, kiel vi vivas ĉi tie en ĉi tiu granda Dia mondo, estas nur infanoj de Dio. La sola kuracisto, la kuracisto de ĉiuj homoj, estas kaj restas nia Di-Sinjoro. Nur Li povas helpi. Sed Li helpas nur al tiuj homoj, kiuj trovis la vojon al Li aŭ al tiu, kiel mi jam diris, kiu estas preta, ekiri la vojon, akcepti la kredon en si kaj vivi kun ĝi. Vi ne bezonas kredi je la malgranda Gröning, sed fidon vi devas doni al mi kaj danki al Di-Sinjoro pro Lia granda ago, pro Lia granda potenco, pro Lia belegeco. Ne mi volas la dankon. Ne. Tiun mi ne meritas. Mi faras mian devon precize tiel, kiel vi la viajn en via profesio... Dependas de la homo mem, kiel li liberigas sin por akcepti la saniĝon. T. e. li devas esti pura. Li devas scii, ke li ne estas blasfemulo kontraŭ Dio. Li devas scii, ke li sentas sin devigita kaj ligita por vivi kun Di-Sinjoro. Tiam li estas pura.”

Ankaŭ en privataj interparoladoj mi aŭdis de Gröning ofte kaj denove ofte la decidan konstaton, ke li havas la respondumon antaŭ Dio, efiki la 'sanigon per la pure Dia

forto' nur ĉe tiuj suferantoj, kiuj havas almenaŭ la bonan volon vivi laŭ la Dia leĝo kaj ekskludi de la sanigo tiujn, kiuj ne estas pretaj rezigni pri la malbono. 'Mi povus', li diris, 'fari amasan sanigon eĉ tiel, ke mi diras: ĉiuj malsanuloj de urbo aŭ lando saniĝas! Sed ĉu per tio ne estus perdita pli ol akirita? ĉu ili ne denove misuzus sian rericivitan sanon? Ne! Unue la homo devas fari internan returnon, unue li devas esti preta por eltiri el si la diablaĵon kaj trovi la vojon al Dio. Nur tiam li estas saniĝinda.

La kontraŭuloj de Gröning akre atakis ĉi tiun pensmanieron kaj deduktis el tio la danĝeron, ke ĉiu malsanulo, kiun Gröning ne sanigas, nun sin sentas forpelita de Dio kaj povus suferi sub ĉi tiu anima ŝarĝo eĉ pli forte ol antaŭe. Gröning mem decide rifuzis ĉi tiun interpretadon de siaj vortoj kaj nomis tion konscia malicaĵo. Kiu alku-timiĝas pripensi vortojn precize, tiu povas kompreni en la frazoj de Gröning tute ne ion alian ol jenon: ke li ĝenerale ekskludas de la ricevo de la saniĝo la malbonulon, la neanton de Dio. Sed tio tute ne signifas, ke nun male ĉiuj aliaj fakte saniĝus. Tio signifas nur, ke ili estas akceptitaj peti la saniĝon. ĉu ĝi en ĉiu unuopa kazo fakte okazas, por tio ankoraŭ ekzistas vico da kriterioj, kiuj estas sendependaj de ĉiu juĝo pri la paciento, - demandoj, pri kiuj Gröning ankaŭ en konfidataj rondoj parolas nur malvolonte.

Pri la kaŭzoj de la krizo de la homaro, kiun ni spertas en niaj tagoj, Bruno Gröning diris (Traberhof, 31a de aŭgusto 1949 vespere):

“Antaŭ jarcentoj la homo devojiĝis de la naturo, de la kredo je nia Di-Sinjoro. Ĉiu kredis je la povo majstri sin mem. 'Nun ni estas sur tiu ĉi tero, nun ni aranĝas nin kiel ni volas tion, kaj ni certe scios helpi

al ni', tion ĉiu kredas. Sed mi sciigas al vi, ke sen Dio povas esti helpata al neni. Kaj kiu kredas retiriĝi de la naturo, kiun Di-Sinjoro tiel bele kreis por ni homoj, tiu iru, kien li volas. Oni kredis, ke oni povus distingi sin de aliuloj turnante sin for de la naturo kaj surirante la ŝtupojn de la kulturo. Tie estas la eraro, tie kuŝas ĉio, tio estas, kio mankas al la homo: la naturo. Reen al la naturo! Reen al nia Di-Sinjoro, reen al la kredo je la bono en la homo!

Ĝis nun malamo kaj envio ne estis nur inter la germanoj, sed inter ĉiuj popoloj de la tero. Ankaŭ tio iam devas ĉesi. Fino estos nur tiam, kiam ĉiu estos retrovinta la vojon al la kredo. Tiam ne plu estos malicaĵoj inter ili, inter la popoloj de la tero. Kaj la paco de la mondo estos savita.”

“La granda returno” bone povas doni respondon al multaj demandoj pri la vojo de nia helpema amiko. Bruno Gröning ja jam ĉe la komenco skizis la fundamentajn verojn de sia instruo. Do ni jene volas prezenti al ni demandojn kaj precize atenti la respondojn, kiujn Bruno Gröning donis en 1949. Ili estas registritaj en “La granda returno”.

Kion la granda helpanto atendas de ĉiuj, kiuj volas akiri saniĝon, tion li diris la 27an de aŭgusto 1949 vespere ĉe la Traberhof:

“Ili estu homoj al homoj. Amu vian proksimumon kiel vin mem! Ne estu malica, ne estu falsema, faru al neni ion malbonan! Vi ĉiuj estu bonaj, reciproke bonaj. Vi sciu, ke vi apartenas unu al la aliaj, ĉu malriĉa aŭ riĉa. Neniam estu envia! Unu havas kaj la alia ne. La plej bona kaj plej granda riĉeco ja ne estas mono, kiel vi pensis. Riĉeco estas sano. Sano estas ĉio,

pli ol mono. Kaj pro tio vi ne havas la rajton paroli pri alia homo, kiu havas iom pli da mono, ke li estas pli riĉa.”

Pri religio kaj konfesio Bruno Gröning parolis la 17an de oktobro 1949 en Rosenheim:

“Oni devas doni al mi nur la fidon, ne nur en la okulojn, sed ĉie, egale, kie la homo troviĝas. Sed la plej granda malfacilaĵo pri tio estas, ke la homo precize cedu al la Dia kredo, kiun li portas en si kaj vivu tiel. Ne estu nur tiel, kiel homoj ĝis nun imagis, ke ili unufoje en la semajno, kaj tio estas en la dimanĉo, iras en la Dian domon kaj preĝas tie, kaj per tio ĉio estus farita por la semajno, kaj poste ili povus agi, kiel plaĉas al ili. Tio estas malĝusta. Se mi diras, ke mi kredas je Di-Sinjoro, tiam mi devas ankaŭ esti homo laŭ tio, devas esti ekzemplo, devas montri, ke mi estas bona homo.”

Intertempe helposerĉanto dankas pro la ĵus aperinta saniĝo. Gröning pluparolas:

“La dankon ne mi meritas. La dankon meritas nia Di-Sinjoro. Danku al Li vian tutan vivon! Pruvu, ke vi estas vere diokredanta homo! Iru en la Dian domon, preĝu tie elkore! Sed ne kiel ĝis nun, ke unuopaj, eble ankaŭ multaj homoj, iris tien nur por vidi, kian veston tiu aŭ alia homo portas kaj por paroli pri li kaj multon da alia malpuraĵo, kion mi vidis kaj aŭdis per propraj okuloj kaj oreloj. Tion oni ne faru. Kiam oni iras al la preĝejo, tiam oni elkore danku al Di-Sinjoro pro ĉio, kion bonan li faris ĉe la homoj.”

El ĉi tiaj vortoj de Gröning montriĝas ankaŭ la malakcepto de ĉia sektismo pri lia persono. Li direktas la homojn en la preĝejojn de iliaj konfesioj. Li postulas de ili la

profundigon de ilia religia vivo kaj atendas de ili praktikantan kristanisman aŭ, kiel li mem esprimis, 'honestan, ageman, kristanan vivon'. Tiel ĉe la aŭskultantoj de liaj paroladoj ĉiam estis konstateble, ke ili sentis sin fortigitaj en sia, ne en nova aŭ ŝanĝita, religia konvinko, ke ili trovis en la saniĝoj videblan konfirmon de sia kredo, ke ili akompanis la saniĝojn per la dankpreĝoj de sia eklezio sen tio, ke iu sentis tion malkonforme.

'Mi volas scii vin ĉiujn bonaj kaj kredantaj', li ofte diris al siaj aŭskultantoj. Li avertas la saniĝintojn kontraŭ la potenco de la malbonulo kaj fortigas ilian atentemon por tio, ekkoni la malbonon ne nur en abomenaĵo, sed multe pli en la tentaĵo, egale, kiel ĝi sin maskas.

Iam li respondis al mia demando: 'Ĥajnas, ke hodiaŭ naŭ dekonoj de la homoj iel adheras al la malbono. Mi devas returni ĉion. Mi devas deŝiri ilin de la malbono, por ke fine certe naŭ dekonoj estu bonaj.' La rolo de la malbono kiel kontraŭparto kaj mezuro de la bono laŭ li estas ĉiama. Ĉiam ekzistos homoj konscie sin submetintaj sub la malbonon, ke ili ne plu povas esti liberigataj. Male Bruno Gröning opinias, ke la plej granda parto de ĉiuj homoj, kiuj faris kaj faras malbonajn agojn, estas viktimoj de kontraŭaj mediaj influoj kaj de propra malforteco kaj iel portas la sopiron al la bono en la koro. Al ili li speciale helpas.

Dum pasis tia interparolado pri bono kaj malbono mi prezentis la demandon pri la libera volo. Kun tute speciala, preciza emfazo Gröning malakceptis ĉian influon al la homa libera volo. 'Mi rajtas helpi al homo, trovi la vojon al la bono, sed mi ne rajtas forpreni de li la decidon pri tio, nek devigi lin al bono. Li devas trovi sian vojon mem.' Ĝuste pro ĉi tiu kaŭzo, ne tuŝi la homan liberecon pri decidoj, li malakceptas sugestion kaj hipnozon kiel diablaĵon.

Kion parolis la plej povraj el la povruloj, kaptitaj de 'neku-raceblaj' suferoj, atendante Gröning antaŭ la Traberhof, tio efektive montris, ke ja al li ili havis simpatian kun korduŝa fideleco. Krom la origina saniga traktado ili sentis sin feliĉaj kaj protektataj, ke ili renkontis bonecan helpemon sen antaŭa pruvilo pri neceso, sen formularoj, demandiloj kaj formalajtoj. Antaŭ ĉio tiuj hontemaj povruloj, kiuj - nekapablaj doni monon por sia saneco - ja ne lernis peti aliajn por tio, sentis kun senfina danko la homan grandeccon de viro, kiu altruisme helpas al ili, sen demandi eĉ pri iliaj nomoj. Kiu ankoraŭ ne konas Gröning pli bone, demandas lin unue: 'Kiujn malsanojn vi povas sanigi?'

Gröning klarigas, ke ĝenerale li povas helpi ĉiun suferon, sed ne ĉiun homon. Ĉe kelkaj eksterordinare gravaj malsanoj dependas de tio, en kia stato la helposerĉanto troviĝas. Ekzistas malsanoj, kiujn li povas 'fortiri' en mallongaj momentoj. Aliaj helposerĉantoj devas prepari sin por pli longaj ŝanĝoperiodoj. 'Mi devas vigligi', li klarigas, 'kio jam longe kuŝis morta. Ne ĉiam estas tuj senteble, ke la nova vivo envenis. Ofte homo devas longe atendi, sed tiam ĝi venas subite. Kondiĉe, ke li ne lasis sin tuŝi de la malbona spirito de dubo kaj malgranda fido.' Al tiaj helposerĉantoj, kiuj devas akcepti atendoperiodojn li volonte diras: 'Inverse ankaŭ estas valore.' Fakte ĉi tiu frazo ĉiam denove aperas. Ĝi klarigu al tiu, al kiu ĝi estas direktita, ke okazis returno kaj dependas nur de li mem, kion li evoluas el ĉi tiu returno. Tiel li finis unu el siaj prelegoj: 'Vi ricevis, laŭ kio vi venis. Nun dependas de vi mem teni ĝin.'

La konservado de la saniĝo sendube postulas de la saniĝinto altan kvanton da kredo kaj da spirita disciplino. Je ĉi tiu tikla punkto decidiĝas la firmeco de la reakirita sano.

Ankaŭ la reguliga doloro sufiĉe ofte konfuzas la helposerĉantojn. La reguliga doloro devas aperi, diras Gröning. Ofte unuopaj homoj ektimis denovan atakon, kiam komenciĝis la reguliga doloro. Ili timis kaj diris: Fariĝis ankoraŭ pli malbone, ni iru al la kuracisto. Gröning: 'Pro tio mi atentigas vin, kiam aperas la reguliga doloro, tiam eltenu ĝin. Ne okazas ia malbono, sed nur, ke la homo saniĝas.'

Al ĉi tiu necesa fido apartenas ankaŭ, ke la helposerĉantoj povas trankvile kredi al Gröning, ke akceptinte la sanigan forton eĉ nur unufoje, ĝi de si mem plue efikas en la homo, kaj ke Gröning, kiel li diras, ĉiam ĉeestas helpanta ĉe la malsanulo, eĉ se plej grandaj spacaj distancoj estas inter ili. "Kiu fidas, tiu nun iru hejmen, kiu malfidas, tiu restu", tion li devis kontraŭdiri al multaj helposerĉantoj, kiam ĉiam denove ili supozis, ke ili povus ricevi pli, se ili postvojaĝas lin ĉien kaj tedas lin postulante per siaj deziroj. Fakte per sia hastemo kaj maltrankvileco ili ĝenas sian propran saniĝon kaj eĉ se ili vidas Gröning ĉiutage, ili atingas multe malpli ol iu alia, kiu modeste kaj fideme profundiĝas en si mem, eble kun la globo en la mano. Estas la vojo internen, kiu gvidas al la celo! Al la humilulo, fidemulo, kredemulo, Dio donas ĉion - ĉi tiun admonon Gröning iam donis al la helposerĉantoj sur ilian vojon kaj forte turnis sin kontraŭ tiuj, kiuj postulas la helpon de lia saniga forto same kiel asekuratoj, kiuj postulas kompenson, por kiu ili pagis la premiumon, aŭ volis instrukcii lin, kiel li plenumu sian mision (kompreneble unue ĉe ili).

Multaj demandoj ĉiam denove temis pri la globoj kaj la ŝargitaj objektoj.

Kiu posedas la maturecon kaj kapablon por koncentriĝi, por la vojo internen, tiu ne estos dependa de la fizika

ĉeestado de Gröning, ĉar li forte sentas lian metafizikan ĉeestadon en ĉiu ŝargita objekto, ofte ankaŭ per la ponto de la pensoj. La saniga globo (aŭ alia ŝargita objekto) efikas, laŭ la propraj vortoj de Gröning, la realecon de lia ĉiama ĉeestado unuflanke, la ligan al sanigaj, ĉielaj radiadoj aliflanke. Ambaŭ certe estas nepre necesaj por la saniĝo.

Gröning: 'Kiam mi estas tuŝinta globon - malgranda parabolo pri nia mondo - tiam revenas ĉiuj radioj en ĝin, per kiuj nia tero estas ĉirkaŭata, kaj donas al la homoj la neniam ĉesantan ligan al la ĉiela radiado.' Ekde tiu momento, kiam homo prenas ĉi tiun globon en sian manon, li spertas plenan novan reguligon. Ĉiuj ekscitocentroj en la homa nervosistemo estas ŝargitaj, tiel ke ankaŭ la sangocirkulado denove ekfunkcias. Ĉiuj malsanoj de organoj kaj membroj estas kontraŭluktataj tiel, ke ili estas venkataj, eĉ se temas pri ege gravaj malsanoj kiel tuberkulozo, osta kario, eĉ misformaĵoj de vertebroj kaj ostoj, kaj kancero en la komenca stadio. Ekzistas nenio, kontraŭ kio oni ne povas lukti per la globo. 'Certe,' Gröning prenas kontraŭdiron, kiun mi prezentis, 'ekzistas homoj, kiuj estas bonaj kaj kredemaj kaj je la komenco ne povas kompreni la sencon de la globo. Ilia eraro troviĝas en ilia malsaneco. Ĉe multaj homoj la sentonervo kadukiĝis aŭ malfortiĝis tiom, ke unue ĝi devas reviviĝi. Povas daŭri minutojn, horojn, tagojn aŭ semajnojn ĝis la nova vivo povas komenciĝi. Sed la forto el la globo komenciĝas sanigi jam en tiu momento, kiam ĝi estas tuŝata la unuan fojon; nur ke en la unua tempo la malsanulo ankoraŭ ne povas mem senti tion.'

Ĉe la uzo de ĉiuj ŝargitaj objektoj estas grave krom la interna prepariĝo ankaŭ ŝajne malgranda, sed tamen tre

signifa eksteraĵo. Oni sidu kun libera dorso kaj ne metu kunen kaj la gambojn kaj la manojn. Laŭ la opinio de Gröning la reciproka tuŝiĝo de la manoj efikas kurtan cirkviton de la vivofluo en la torso; kuŝado kuna aŭ eĉ krucado de la gamboj havas la saman rezulton en la malsupra parto de la korpo. Kiam oni konsideras pli longan periodon, tiu, kiu pro kutimo faradas tiajn erarojn, povas altiri ege malagrablajn malsanojn.

Ankaŭ jenon mi demandis lin, ĉu li iam prenos sian forton en sian tombon: 'Kiam mi ne plu estos ĉi tie, la homoj estos tiom maturaj, ke ili povos sanigi sin mem.'

La granda returno

La akuzo kontraŭ laŭ la senco de la vorto sensana tempo estas starigita sole per la apero de la helposerĉantoj antaŭ la Traberhof en Rosenheim kun elementa impeto. Ĝi troviĝas en la pli ol kvarona miliono da leteroj al Bruno Gröning malkaŝe kaj ofte, ankoraŭ pli emocie, inter la linioj. La teknike materiisma evoluo gvidas per specialigo al disiĝo de la unueco de ĉia vivo, kaj la grandaj inventoj servas ĉefe por doni al la volo por detruiri tian larĝan efikon kiel neniam antaŭe.

Ni devas paŝi el mekanisma epoko al epoko de la vivaĵo, en kiu la fortoj de la tekniko ne plu estos la demonoj, sed la servantoj de la homo kaj en kiu por la interrilatoj inter la unuopuloj same kiel inter la popoloj denove validas tiuj leĝoj, kiuj rezultigis el la grandaj kulturreligioj.

La aŭguro de Gröning estas, ke la homoj lernos ankoraŭ dum sia vivado sanigi sin mem per la forto, kiun li peras. Sed inter tiu estanteco kaj la estonteco de la memsanigado de la homoj devas esti jeno: la granda returno!

El kio devas konsisti ĉi tiu returno, kien ĝi gvidu nin, tion ni ekkonas plej klare, se ni esploras, kien fakte nin gvidis la malĝusta vojo, kiun ni sekvis certan tempon.

Sed ke viro ĉerpas la sanigan fluon el nekonata senfineco, ke li kapablas per sia tuŝado transigi ĉi tiun forton de la vivo al ĉiu objekto, kaj ke per la potenco estanta en lia mano li volas nenion alian ol ke la homoj sin deturnu de la memmortiga iluzio de la materiismo kaj agnosku la realecon de forto reganta super ili - tio povas esti unu el la signoj, per kiuj anonciĝas vera epoka ŝanĝo. Ĉar ĉiuj atomurboj kaj iliaj aroj da laboristoj kaj iliaj kleruloj ne kapablas krei tiun forton de bono kaj sanigo, kiu fluas al la kredanto el unu sola globo, kiun la mano de Gröning tuŝis." Iis tie doktoro Trampler.

Gröning - dokumenta filmo

Meze de ĉi tiu tute granda okazaĵo ĉe Traberhof apud Rosenheim inter la 15a de aŭgusto kaj la 29a de septembro 1949 estis produktita ĉi tiu filmo.

En 1974 la instruo de Bruno Gröning estis konservata de ankoraŭ malgranda nombro da amikoj kaj helposerĉantoj. En la konscio de la publiko la nomo estis neglektita. Sed ke Bruno Gröning ne kaŝis siajn kapablojn, tio montriĝas el lia pozitiva taksado de la dokumenta filmo de la jaro 1949. Por li estis gravaj ne la atentigaj anoncoj en la filmrevuo, sed la vero. Stacio dum la vivovojo de nia helpema amiko, kiu multe kontribuas al la volo kaj strebado de Bruno Gröning, se ni rigardas ĝin kun interna trankvileco.

En la filmgazeto:

La viro en la atento de la tempo!

GRÖNING

Filmo, kiun ĉiu devas vidi

Dokumenta filmo, produktejo Rolf Engler-Film

Ludonado: Herzog-Film G.m.b.H. (kompanio kun limigita respondumo)

Muziko: Georg Engler

Kamerao: Bert Höchst, Hans Lutz

Registrada gvido: Gerhard Schindler

Eltiraĵo el la filmgazeto:

“Gröning, oni nomis lin 'Mesio de Herford'. Gröning, homo de profunda religiemo, strikte rifuzis ĉi tiun nomon.

Dum la ĉeestado de nenombritoj, antaŭ la severaj okuloj de altaj fakultatuloj de la kuracista scienco, li efikis saniĝojn, kies unikeco estas certa.

La kvanto de la kredantoj je li supozeble estas milionoj! Milionfoja estos la intereso pri la dokumenta filmo, ĉar per konkerantaj bildstrioj ĝi montras en la simpleco de sia raportanta lingvo la mirindan agon de Gröning ene de malsana, suferanta homaro.

Ni rigardas en la vizaĝon de ĉi tiu magra asketo, ni ekkonas la fortoplengan streĉon, la profundan mergiĝadon en la taskon doni mildigon al suferanto, por helpi lin. Ni spertas la viglan diskutadon, la deflankiĝon de liaj okuloj al malproksimaj lokoj... Kiu estas ĉi tiu viro, al kiu sin turnas tiu grandega intereso, pri kiu la medicina mondo komencas paroli kiel pri 'viro sen ekzemplo'?"

La titoloj:

“Viro el la popolo”

“La saniga forto de lia volo”

“Gröning inter dubantoj kaj konfirmantoj”

“Gröning - kuracisto de la animoj”

Kaj Bruno Gröning mem skribas la antaŭparolon por ĝi.

“La filmo, kiu aŭtentike raportas pri mia sanigmetodo, portas mian nomon.

Mi subtenas, ke per sia dokumentiga karaktero ĝi ebligas senantaŭjuĝe meti en la lumon de la publiko ĉion, kio estas skribita, parolita kaj rakontita pri mia ago, miaj sukcesoj kaj laŭdiraj limoj.

La filmo intervenu per objektiva reproduktado de la okazaĵoj ĉirkaŭ mi kaj estu pretiganto por tio, kion mi alstrebas kun arda koro kaj per nelacema laboro:

Helpi kaj sanigi homojn!

Bruno Gröning”

La vojo de Bruno Gröning

Je la kulmino, kiam la tuta mondo estis informita pri lia ago, estis du malfermitaj vojoj por Bruno Gröning: tiu, kiu lin farigus la plej riĉa homo de la mondo kaj donus al li gloron kaj honoron, aŭ la vojo de humileco.

Ekde tiu tago, kiam Bruno Gröning estis tirata al la monda publiko, homoj ekkonis, ke ili trovis en li viron, kiu estas alia ol ĉiuj aliaj. Per tio oni povas famiĝi kaj gajni monon. Kaj pro tio ĉiam ekzistis homoj, kiuj sentis sin altiritaj kaj ĉiam premis lin per sia preteksta helpemo. En la tempo ĝis lia morto ili kaptis lin per flataj vortoj kaj malfaciligis lian vivon, kiun li tute ne plu povis elteni. Ĉu mono kaj gloro?

La eldonisto de la revuo “Die grosse Umkehr” (La granda returno) 1950 en la numero 1 skribas inter alie: “Por Gröning estus facilaĵo, fariĝi la plej riĉa homo de la mondo, se oni povus aĉeti ĉe li la sanon. Verŝajne oni ne plendus pri tio, ĉar per tio lia ago estus “laŭ la tempo”. Ke li ne volas havi monon, sed anstataŭe atendas internan returnon, veran ŝanĝon de la vivmaniero de la malsanuloj, kiuj venas al li, per tio li superas la mezurilojn, per kiuj liaj samtempoj mezuras, kaj suspektigas lin ĉe tiuj, kiuj ne povas kompreni, ke mono tute ne interesas homon el la dudeka jarcento.”

Kion volas Bruno Gröning? Li volas helpi kaj sanigi kaj regvidi la homojn al Dio, li mem diris: “Mi volas scii ĉiujn bonaj kaj kredantaj. Mi volas, ke ili retrovu la veran, Dian instinkton, kiun ili perdis. Atingi tion, tio estas mia tasko.” Li serĉas la vojon por povi libere kaj neligite agi. Por tio li serĉas helpantojn.

Kion liaj helpantoj ofertis al li?

En Herford la laborgrupo Pharmadyn r. a., oficejo Bielefeld, sub la aferdirektanta estrarano prof. d-ro B., proponis varbi pluajn membrojn, kiuj poste samtempe estu senpage membroj de la "Rondo de la amikoj de Bruno Gröning". Tiam en Herford, Wilhelmplaco 7, je la 12a de julio 1949, estis interkonsentita jeno:

1. Bruno Gröning faros dum la ĉeestado kaj sub la kunlaboro de science agnoskitaj fakkuracistoj pli ol cent kuracadojn aŭ sanigojn. Ĉiujn antaŭkondiĉojn por neri-proĉebla juĝado prizorgu la menciitaj kuracistoj.

2. Kiam ekzistos tiu materialo, tiam prof. d-ro B., krome la komisiito de Gröning (rondo de la amikoj), kaj ankaŭ Gröning mem, kune prelegos pri malsano kaj saniĝo en ĉiuj urboj de la tri zonoj kaj tiel aperos antaŭ la publiko.

3. Devas esti konstruitaj sanigejoj por la pacientoj serĉantaj saniĝon ĉe Gröning (ĝis hodiaŭ la nombro estas preskaŭ 100.000), - se necese pluraj.

Kiel ni jam estas eksciintaj, post la kuracista esplorado en la kliniko de Heidelberg, kiu rezultis bone, Bruno Gröning nun des pli ricevis la firman promeson, ke la vojo por lia plua libera ago nun fine estos liberigita. Estu je lia dispono sanigejoj, en kiuj ankaŭ kuracistoj laboru. Tio por tio, por povi plej ekzakte kontroli ĉiujn kazojn, por ricevi pluajn konfirmojn ne nur por la publiko, sed ankaŭ por prezenti al la medicino.

Tute alian oferton, kiun prezentis la familio Harwart al Bruno Gröning, nome veni al Traberhof, sen akcepti financajn devojn, Bruno Gröning akceptis kaj nomis tiun domon sanigejo.

La asocio de kulturfilmamikoj en Zuriko penis en Svislando popularigi Bruno Gröning donante la sekvan anoncon kun foto de Bruno Gröning en svisan gazeton:

“Gröning denove sanigas!

Tiel tekstas la plej nova titolo en la germanaj ekstraj eldonaĵoj.

Rigardu ankaŭ vi tiun objektivan intereseĝan, laŭfaktan raporton faritan sub plej preciza kontrolo de kuracistoj kaj publikaj instancoj kaj mem juĝu pri ĉi tiu viro, kiu tenas la scivolecon de centmiloj:

Venonta dimanĉo, antaŭtagmeze 10.30 h, Film-Matinee (10a ripeto)”

La 4an de majo 1950 aperis artikolo en Wochenpost (semajna poŝtaĵo): “Gröning en nova lumo! Dolaroj logis... Gröning ne foriris!” Pri tio mallonga eltiraĵo:

Subite la trankvileco estas interrompata per motora bruoj. Veturilo haltas antaŭ la enveturejo. Voĉoj laŭtiĝas, oni postulas Gröning. Vira figuro aperas en la pordokadro kaj raportas, ke ĵus alvenis usonano kaj filmisto, kiuj havas gravajn aferojn por preparoli kun li. Temas pri usona ĵurnalisto, reprezentanto de monda novaĵ-agentejo, kaj pri sinjoro de gvidanta germana filmkompanio, kiuj volas inviti Bruno Gröning al turneo en Ameriko. Gröning atente aŭskultas kaj tuj estas preta pli detale traktadi kun la vizitantoj. 'Estu gastvizito, sinjoro Gröning!' diris la usona ĵurnalisto enkonduke kaj provas prezenti al la mirakla doktoro de Herford jam ellaboritan planon. Laŭ ĝi Gröning vojaĝu kelkajn semajnojn al Usono kaj sanigu tie riĉajn pacientojn. Poste la enspezoj servu por la konstruo de liaj planitaj sanigejoj en Germanio.

Ĉar la grundo devas esti propagande preparita, Bruno ne uzu aviadilon por la transiro, sed li ekvojaĝu per ŝipo. La usonano mallonge pripensis kaj aldonis, ke li jam

aranĝis, ke sur la ŝipo li povos hazarde prezenti al Gröning malsanajn pasaĝerojn, ĉe kiuj li povos fari sanigajn provojn.

'Fariĝos sukcesego', opiniis la produktisto al Gröning. 'Vi ne imagas, kian alvenon oni prezentos al vi ĉe la alveno en Nov-Jorko: Kompreneble vi devas ligi vin, plenumi la fiksitajn datojn por garantii glatan turneadon! Por la amasaj sanigoj transe estos je via dispono diversaj haloj', akcentas la usonano, 'ekzemple Madison Square Garden' en Nov-Jorko, en kiu estas loko por pli ol 20.000 homoj. Plenan domon oni jam nun povas garantii. Kompreneble la spektantoj devas ankaŭ pagi ion.'

“Mi pensas, inter 5 kaj 20 dolarojn oni povas postuli por unu loko', aldonas la filmisto kaj daŭrigas: 'Oni povas organizi ankaŭ viziton ĉe la kvakeroj kaj aliaj usonaj helporganizoj. Ke la sanigoj ĉe tiaj organizoj estu senpagaj, tio estas memkomprenebla, sinjoro Gröning. Samtempe ni povas komenci fondi interesokomunumon en la ŝtatoj. Ni zorgus persone, ke vi restus izolita dum la restado en la ŝtatoj, por malebligi kontakton kun malbonaj negocantoj!”

Tiajn kaj similajn ofertojn Gröning ricevis ĝis lia irado hejmen.

En la lastaj jaroj atingis Bruno Gröning alispeca oferto en Francio. Se li akceptus ĝin, tiam en unu momento li estus perdinta ĉiujn financajn zorgojn de la granda proceso. Li rezistis, ĉar li devus ligi sin. Kaj tamen ĉe ĉio ĉi li ankoraŭ havis la humuron, ŝerce voki al la amikoj en Rosenheim: “Vi estas malbonaj!” kion ili jesis. “Jes, estas bone, ke vi malakceptis ĉi tiun oferton!”

Kial Bruno Gröning ne akceptis tiajn logantajn ofertojn? Povas vere kompreni lin nek amiko, nek malamiko.

Depende tute de si mem li ekpaŝis vojon, kiu estis pli ol dorna kaj kruta, li ekpaŝis vojon de humileco. Li mem diras pri tio jenon:

Kial mi ĝenerale faras tion, ke mi baraktas por la homo? Kion mi volas de la malsanulo? Kion mi ĝenerale volas? Ĉu mi volas gajni monon? ĉu mi volas fariĝi riĉulo? Aŭ ĉu mi volas helpi al la homo? Kaj riĉiĝi, jes, se oni asertas aŭ se homoj opinias, ke mi faras tion por riĉiĝi, por esti riĉa je mono kaj posedaĵoj, tiam mi povus pruvi al vi ion alian, t. e. la kontraŭon de ĉi ĉio. Sed ke mi fariĝis riĉa, tion mi ne volas kontesti. Tion mi donas al via vojo, ke mi en tiu mallonga tempo, kiam oni tiregis min al la monda atento, mi vere fariĝis riĉa homo. Tamen nek granda, nek impona, sed riĉa. - Riĉa je forto por povi helpi kaj sanigi homojn.

Kaj precize same estas ankaŭ mia vojo, la vojo de la suferado. Mi ne suferas por mi mem, mi ne bezonus tion. Se mi dezirus riĉiĝi je mono kaj posedaĵo, tio estus tre facila por mi, tiam mi jam estus la plej riĉa homo sur tiu ĉi malgranda tero, sed mi estus riĉa nur je mono kaj posedaĵoj. Sed, ĉar mi malakceptis tion, tial vi ne bezonas oferti monon al mi. Mi ĉion malakceptis. Kaj se mi diras al vi, ke mi ne ricevas eĉ unu unuopan pfenigon pro tio, tiam ankaŭ tio estas la vero. Mi ne bezonas ĝin kaj tamen mi devas suferi malgraŭ mia boneco kaj helpopretemo. Mi ne volas akcenti tion. Ĉar multaj homoj estas agantaj, kiuj ĉi ĉion ne komprenas.

Kaj nun ni denove volas revoki en nian memoron la unuopajn staciojn de ĉi tiu dorna vojo.

En Herford per la malpermeso por sanigi komenciĝis la

strebado de Bruno Gröning trovi vojon, sur kiu li povas libere agi. Pro tio li komisiis Egon Arthur Schmidt, fondi en Herford la asocion “Rondo de la amikoj de Bruno Gröning”.

Pro tio li ekiris la vojon al Heidelberg por prezenti al la kuracistoj sian efikadon.

Pro tio post la tempo de Traberhof li akceptis, ke estis fondita la “Asocio por la esplorado de la Gröningaj sanigaj metodoj” fare de Otto Meckelburg.

Pro tio li konsentis, ke homoj volis doni je lia dispono sanigejojn.

Pro tio li devis submeti sin al la proceso en la jaroj 1952 kaj 1953 kaj malgraŭ la absoluta verdikto li devis akcepti, ke li devis peni pri atestilo, kiu flanke de la ŝtato permesas lin praktiki la 'kuracadon'.

Pro tio li akceptis ankaŭ ĉi tiun humiligon kaj penis pri allaso al la naturkuracista ekzameno.

Pro tio li konsentis ankaŭ la agon de sinjoro Bachmann, ekfunkcii en lia nomo 'biologie dinamikan laboratorion' por produkti du biologiajn katalizilojn “G 52” kaj “L 52”.

Pro tio li fine kreis la antaŭkondiĉojn por la fondo de la Gröning-Asocio.

Eĉ post lia dua edziĝo por Bruno Gröning ne restis tempo por privata vivo. Por regi la postulojn, al kiuj li estis submetita, li oferis sian tutan tempon. Lia dorna vojo estis borderita de multaj procesoj kaj fine de la granda proceso.

Li denove kreis la antaŭkondiĉojn por la fondo de la “Asocioj por la subteno de anime-spiritaj kaj naturaj

vivbazoj” en Germanio kaj en Aŭstrio.

Kaj en plej alta humileco kaj sindoneco Bruno Gröning iris al Parizo por tie oferi sian vivon.

Traktante la vorton 'ofero' ni homoj estu tre zorgemaj. Sed ĉi-kaze, kiam Bruno Gröning mortis en Parizo, ĉi tiu vorto estas la vero en sia tuta pezo.

La “ĉi-estado” de Bruno Gröning

“Mi sciigas al vi,” diris Bruno Gröning ofte. Jes, de kie Bruno Gröning prenis ĉi tiun scion? De kie prenis ĉi tiu simpla, memkonscia homo la forton por sia efikado? “Estis ĉio en mi ...”, li diris. “Ĝi ne estas homa, sed Dia forto.”

“Mi sentas kiel mian devon, redoni al la homo la ekvilibron, direkti lin tiel, ke li regos la materion.”

“Al la homo estu redonita la konscio, ke lia korpo nur tiam estas valora, se ĝi troviĝas en la Dia ordo.”

“Neniam devas okazi, ke la korpo destinas la spiriton, sed la spirito (destinu) la korpon.”

“La homo agas laŭ sia volo. Kia la volo, tia la penso. La penso movas la homon al ago.”

Kio estis la volo de Bruno Gröning? “Vi sciu, ke vi apartenas unu al la alia. Vi amu vian proksimumon kiel vin mem. Tio estas mia deziro, tio estas mia volo, ke tio okazu. Kiam okazas, ke la homoj denove sin trovu, tiam ĉi ĉiuj ricevos la eblecon de la helpo.”

Bruno Gröning realigis ĉi tiun sian volon per sia ago. Li kunigis la homojn ĉie, kie li nur povis.

Post la Traberhof-tempo li senriproze laboris. Kie ajn li aperis, li estis ĉirkaŭita de homoj, kiuj serĉis lian helpon kaj sanigon; kaj ĉie estis okazaĵoj nekompreneblaj, grandaj. Li donis al la homoj la plej gravan scion por ilia vivo, li helpis kaj kondukis la homojn al ilia savo. Tiel okazis ĉe sennombraj unuopaj vizitoj en restoracioj, hoteloj, privataj ĉambroj, jes, eĉ sur stratoj kaj ĉe benzinetoj. Kaj ĉie en Germanio Gröning estis renkontebla,

kaj kiam raportistoj serĉis lin, li estis estinta tie. Kie li estas nun? Neniu sciis tion. ĉiam li iris tien, kien li sentis sin tirita, kie helpobezonantaj homoj atendis lin kaj sopiris lian alvenon kun plena koro.

La ege aspiritaj sanigejoj ne realiĝis. Al Bruno Gröning kaŭzis grandan trompiĝon liaj kunlaborantoj kaj la publikaj instancoj.

Kiam la naturkuracisto Enderlin en Munkeno donis sian privatan loĝejon je lia dispono, Bruno Gröning regule venis al Schwabing, Nicolaiplatz. Dankskribaĵoj kaj sukcesraportoj el ĉi tiu tempo estas en la arkivo grandamplekse. Poste Bruno Gröning prelegis en la domo de grafino Weikersheim, Gräfelting. Ankaŭ de tiu ago ekzistas raportoj.

Kiam oni tiregis Bruno Gröning antaŭ la juĝejon pro malatento de la leĝo pri naturkuracado, li tamen estis deklarita senkulpa, lia advokato d-ro A. Roedel skribas en la gazeto inter alie: “La Leĝo pri naturkuracado ne validas por Gröning. Ĉia kunvivado de homoj okazas sub certaj normoj, kiuj jam rezultiĝis pro neceseco jam en la prakomenciĝo de la homa historio kaj kiuj determinas la rajton de la unuopulo kaj de la homa socio. Ĉar ĉia kunvivado de homoj bezonas agnoskon de certaj ĝenerallaj postuloj, kaj ĉar aliflanke ĉi tiuj postuloj rezultiĝas el la strukturo de la homa naturo, ni nomas tiajn normojn naturrajto. Tiu naturrajto unuavice estis skribe konservita en la ordonoj de la granda eklezio. Poste ĉe ĉiuj popoloj ĝi estis transprenita aŭ kiel kutimjuro, aŭ kiel skriba juro kaj ankrita en la grandaj leĝigaj verkoj.

Kiel en la naturrajto baziĝas la rajto je sufiĉe da nutraĵo por la savo de la homa ekzisto, tiel ankaŭ la sano de la homo estas valoraĵo, kies konservado aŭ reakiro aparte-

nas al la naturaj rajtoj de ĉiu homo. Ĉi tiu nevendebla rajto tiel forte baziĝas sur tre profundega, homa sopiro, ke ĉiu limigo aŭ malhelpo estas sentata kiel forta enmiksiĝo kaj ankaŭ neniam trovos agnoskon kaj priatentadon. Same kiel la sopiro al sano kaj saniĝo neniam povas esti limigata per leĝigaj procezoj, tiel ankaŭ ne eblas limigi la forton por saniĝo, kiu estas en ĉiu homo. Ĉia skribita leĝo, kiu ne respektas ĉi tiujn postulojn, kontraŭas la naturrajton kaj falas en la neaknoskon kaj fine al la malatentado, ĝis saĝa leĝdonanto konvenigas tian leĝon.

Unu el la leĝoj, kiuj tiel estas malatentigitaj, estas la leĝo pri naturkuracado de la 17a de februaro 1939. Kreita el spirito, reguli ĉion kaj subĵeti ĉion sub la ĉiopotencon de la ŝtato misatentante la rajton de la individuo, ĝi estas tipa leĝo de pasinta epoko, en kiu estis la intenco gardi kaj reguli ĉiun paŝon de la homo kaj kiam ĉiu libera evoluo de individueco estis ŝtatperfido.

Ekzistas homoj, kiuj posedas ankoraŭ ne esploritajn fortojn, kiuj estas pretaj, doni ĉi tiujn fortojn je la servo por la homaro kaj tiel helpi en kazoj, en kiuj nek saniĝo nek mildiĝo eblas laŭ la hodiaŭa scio de la scienco. Ĉi tiu ebleco por helpi al la homaro, kiel natura rajto de ĉiuj homoj, ne povas esti limigata aŭ malpermesata.

Unu el tiaj homoj, kiuj estas benitaj, helpi al aliaj homoj kaj al kiu estas donita la forto por sanigi, estas Bruno Gröning, kuracisto ekde la naskiĝo kaj per la favoro de Dio forte kredanta homo, kiu, absorbite de sia misio, havas la volon, dediĉi ĉi tiun forton kuŝantan en si por la utilo kaj bono de la homaro, de ĉiuj malsanuloj kaj helposerĉantoj. Helpi lin, kaj tiel al la malsanuloj, estas nia tasko, por ke ne sufokiĝu la saniga forto en la densa arbustaĵo de limigaj paragrafoj.

Se ni kiel bonkonduktaj subuloj, ne turmentitaj de malsanoj, liberaj de ĉia impulso, servantoj de tiu leĝo, demandas nin, kiel la ago de Gröning povas konkordiĝi kun la leĝo pri naturkuracado, tiam oni konsideru ankaŭ jenon: Ankaŭ laŭ la leĝo pri naturkuracado, neprofesia aŭ sennegoca kuracado licas al ĉiu. Kiu neprofiteme - tiel la motivo de la leĝo - helpas al siaj kunhomoj por eviti aŭ sanigi malsanojn, tiu povas esti kaj estu ne malhelpata je tio.

Neprofesie kaj sennegoce: Gröning ne akceptis pagon pro la sanigoj. Lia devizo estas: Kiu nenie trovis saniĝon, tiu venu al li, lasante monon kaj timon hejme, kunportante kredon kaj tempon. Kredon, ĉar ĝi estas neevitebla antaŭkondiĉo por ĉiu saniĝo, tempon, ĉar ĉiu saniĝo bezonas certan tempon.

Tial ĉi tiu libera saniga ago, kiun Gröning faras, tute ne falas sub la leĝon pri naturkuracado. La leĝo mem konsideras ankaŭ ĉi tiun kapablon, se en § 8 ĝi postulas, ke tiu, kiu volas peti la akcepton kiel naturkuracisto, devas pruvi siajn kurackapablon kaj kuracsukcesojn por periodo de minimume 3 jaroj.

Do oni devas koncedi al Gröning, ke li agas pro libera servo pro amo, kaj ankaŭ la gardantoj de la paragrafoj sub ĉi tiu aspekto devas koncedi al li tian agon por saniĝado, por pruvi tiel la sanigan kapablon kaj la sanigajn sukcesojn. Ankaŭ ĉe severa interpretado de la leĝo oni devas konsenti, ke ago, kiu servas por la esplorado de la fortoj, kiuj estas en tiu viro, ankoraŭ ne estas profesia ago, ĉar fine ankaŭ Gröning devas havi por ĉi tiu intera stadio la eblecon por labori kaj esplori.

Malpedanta ŝtata administrado por eviti la riskon, ke ĉi tiu viro perdiĝu, jam hodiaŭ donas esceptan permeson,

ĉar Gröning prezentis publike jam sufiĉe da pruvoj pri sia saniga ago kaj siaj sanigaj sukcesoj kaj la fakto de la publikeco same estas konata al la publikaj instancoj. Oni devus supozi, ke burokrata traktado de la leĝoj povus esti malatentataj por la intereso de multaj kaj multegaj malsanuloj kaj helposerĉantoj. Tiel estus pruvita, ke la ŝtato servas por la bonstato de la komunumo."

Ni bedaŭrinde scias, ke oni donis al Bruno Gröning nek esceptan permeson nek akceptis lin je la ekzameno por naturkuracisto.

Kion Bruno Gröning volis fari post ĉi ĉiu nekomprene-
mo de la oficialaj instancoj? En notlibreto ni trovas
notojn pri lia interna indigno:

Kiu donas al kiu la rajton, malpermesi al mi la sanigadon de malsanaj homoj, kiuj fakte estis plene kaj tute malesperigitaj fare de la kuracista-ro. Komparo: rompita kruĉo, aŭ io simila, rubaĵomontoj.

Sennombraj miloj da malsanuloj (rigardu Traberhof), loĝejoj kaj malsanulejoj esperoplene atendas saniĝon. Kiu transprenas la respondu-mon? Je la nomo de ĉiuj malsanuloj mi akuzas ĉi ĉiujn, kiuj malpermesas la sanigadon de malsanuloj!

Kontraŭmalpermesa leĝo ne povas ekzisti kaj nun-tempe ankaŭ ne ekzistas en Germanio, same ankaŭ ne en aliaj landoj.

Patro plene respondumas pri sia familio. Li devas zorgi pri la bonstato de ĉiuj familianoj, k.t.p. (Rigardu la patron ŝtato)

a) Kiu formas la ŝtaton? - La homoj.

b) Kies devo estas zorgi por la bonstato de la ŝtato?

- La ŝtatestraro.

c) Ĉu ni estas respondumaj pri la bonstato de la ŝtatestraro aŭ ĉu la ŝtatestraro respondumas pri nia bonstato?"

Bruno Gröning ne rezignis kaj neniam rezignis trovi vojon por doni al la homoj helpon kaj saniĝon sen konfliktiĝo kun la sekulara leĝo. Li serĉis kaj senpaŭze laboris, por ke li povis sciigi al siaj amikoj je la 9a de junio 1953:

“Miaj amikoj, sennombraj helpokrioj el la tuta mondo atingas min ĉiutage. Pro tio devas esti konstruita saniĝejo, kie mi povas agi en ordigitaj cirkonstancoj. Multe da mono estis ofertita al mi por tio, sed mi devis malakcepti ĝin, mia verko ne toleras negocantojn. Mi rajtas akcepti helpon nur de homoj, kiuj havas puran koron. Pro tio mi decidis, fondi kompanion (kompanion kun limigita respondumo) kun mia nomo, kiu laŭ miaj indikoj kaj sub mia kunagado produktas sanigilojn. Tiel povas esti helpata al malsanuloj en la tuta mondo kaj tiamaniere mi povas akiri la rimedojn por establi saniĝejon.

Por la produktado de tiaj sanigiloj estas je mia dispono laboratorio kun ĉiaj modernaj helpiloj kaj stabo de sciencaj kunlaborantoj. Laŭ miaj indikoj estis produktitaj jam certa kvanto da sanigiloj, per kiuj rezultiĝis sukcesoj neniam atingitaj ĝis nun. Ĉi tiuj novaj efikantoj estis elprovitaj kaj prijuĝitaj plej bonaj krom de multaj kuracistoj ankaŭ de la universitata kliniko en Munkeno. Pro tio la bavaria ŝtata ministerio pri internaj aferoj donis licencon por tiuj preparaĵoj. La farmacia industrio montris grandan intereson pri ĉi tiuj preparaĵoj: Eksterlandaj

fabrikoj volis transpreni la distribuon, konataj firmaoj proponis aĉeti unuopajn receptojn.”

Kiel ĉiam, denove okazis mirindaĵo, kion ajn Bruno Gröning faris por siaj helposerĉantoj - tio sanigis. Atestiloj kaj kuracistaj ekspertizoj pruvis la grandan efikon de la preparaĵoj “L 52” kaj “G 52”. Ankaŭ ĉi tiu entrepreno de Bruno Gröning malsuk-cesis, ĉar evidentiĝis, ke tiuj homoj, promesintaj al li helpadon, ne havis puran koron kaj kiuj fine, kiel montriĝis, agis nur por la propra financa avantaĝo. ĉiam en tiaj aferoj okazis, ke la koncernitaj, tiel nomataj “amikoj” miris, kiel Bruno Gröning subite kondukis kontraŭ ili, kiel li tiam sciis agi, por ke ili indigne sin turnis kontraŭ li kaj per ĉiaj financaj rimedoj batalis kontraŭ li.

Ĉi tiu stranga okazaĵo ĉirkaŭ Bruno Gröning estis nekomprenebla kaj nekredibla ofte eĉ por siaj plej internaj amikoj. Nur tiu, kiu havis tute firman fidon al Bruno Gröning kaj samtempe estis neskuebla, tiu povis ekkoni, kial Bruno Gröning devis ĉiam agi tiel, kiel lia tasko destinis al li.

Iam en prelego li diris ĉion, kio servas al klarigo:

“Kion homoj ĝis nun ne lasis neprovite, tio estis gajni monon per la scio kaj kapablo de tiu malgranda viro. Ili opiniis esti trovinta ĉi tie orminejon, parte ili eĉ havis la eblecon gajni monon, sed dank' al Dio, ili ne havis utilon de ĝi. Ankaŭ tiuj homoj devis esti, nome por prezenti, kiu estas la homo, ke la homo akceptas homan morton kaj ne demandas, ĉu eblas helpi al la malsanuloj aŭ ne. Ekzistas homoj, kiuj akceptas homan morton, tiuj tute trankvile povas pretervidi kuŝantan malsanulon. Tiaj homoj neniam demandis pri tio kaj nenion

preterlasis por esti en mia proksimeco. Mi scias, tie kaj tie ĉi oni demandas: "Jes, se tiu viro scias tiom multe, kial li ne scias tion, eble li tute ne scias ion!" Ĉu kaj kiom profunde mi scias, tion vi iom post iom ekscios. Sed tio devis okazi! Tiu materialo mankis por tiu konstruado, por liberigi la vojon por vi ĉiuj. Mi devas havi ĉe mi unuopajn homojn, t. e. kiel vi kutime diras: "Li devas prezenti la dorson. Li ja ne sciis, kial mi toleris lin ĉe mia flanko. Li devis, ĉar mi sciis, kion li volis. Li kaŭzis neniun damaĝon. La estonteco pruvos, ke mi dankos al tiuj homoj. Kaj ili ĉiuj estos registritaj per la nomo, registritaj en unu libreto, por ke ili ne plu povu forkuri. Ĝis nun tio estis registrita en la ĵurnalo, sed la ĵurnalon oni forĵetas, libreto restas kaj ĉiu vidas, kiuj ili estas."

Kion Bruno Gröning diras ĉi tie, pri tio ni ne alkutimiĝis aŭdi, kaj des malpli ni estis alkutimitaj, ke homo, kiu antaŭe scias, ke tiu kaj alia damaĝos lin, tamen tiras lin al sia flanko, ebligas al li ĉiujn eblecojn por povi fari bonon. Jes, li ja jam scias, ke tiu faros la malon de la bono. Kaj tamen Bruno Gröning ĉiam denove faris tion. Li diris en la jaro 1954 al mi:

"Mi scias ĉion. Sed se mi dirus, tiu estas mensoganto, trompanto, ŝtelanto, tiam neniuj homoj kredus al mi. Mi devas doni al la koncernato la eblecon por la returno kaj tiam la liberecon, kaj se li tiam mensogas, trompas kaj ŝtelas, nur tiam la homoj kredas tion kaj ekkonas, kiu li estas. Kaj tiam mi ne estas malkuraĝa por batali."

Tiel Bruno Gröning fine montras ĉiun el ni kiel tiun, kiu li estas. Kaj tiamaniere disiĝas la spiritoj ĉe li, tiuj, kiuj estas purakoraj, faras erarojn kaj lasas sin instrui kaj iras

kun li la Dian vojon kaj tiuj, kiuj ne estas purakoraj, kiuj restas neinstrueblaj por plue atingi mondan avantaĝon kaj defalas. Pere de Bruno Gröning la spiritoj estis disigitaj. Tion ni tute akre spertis kaj la novuloj de hodiaŭ spertas tion same, ke unuj akceptas la kredon, kiu gvidas nin pere de Bruno Gröning sur la vojon al Dio kaj la aliaj diras “ne”. Pro tio Bruno Gröning estas por tute certa parto de la homoj kvazaŭ la ruĝa tuko.

Ni povas nur supozi en respekto, kian signifon ĉi ĉio havas por la malproksima tempo, kiam li parolas pri la libro, en kiu ĉiu estos registrita kaj konservata. Ĉiu homo estas kaj restas responduma por siaj agoj sur la tero.

La ĉeestado de Bruno Gröning sur ĉi tiu tero tiusence havas nesupozitan signifon. Kiu helpis al li purakore ekkonstrui lian verkon, la Dian verkon sur ĉi tiu tero? Kion li donis por tio? Kaj kiu starigis sin kontraŭ tio? La samo validas por la nuntempo kaj por la estonteco!

La verko de Bruno Gröning

Bruno Gröning kreis verkon, kiu estas malfermita por ĉiu, sendepende de konfesio, nacio kaj haŭtkoloro.

En la jaro 1954 li diris al ni: “Nun mi konstruas domon sur la tutan mondon.”

Lia misio estis, ke li provizis en tiu domo ĉion tiel, ke ĉiu, kiu estas favorita loĝi en ĉi tiu domo, povas farti bone. Li povas servi sin je ĉiu instalaĵo, li povas libere moviĝi, li povas lerni, li povas vivi laŭ la leĝoj de Dio. Al ĉiu homo Bruno Gröning malfermis la pordegon en ĉi tiun Dian domon. Kiu havas la volon por forlasi la suferan vojon, tiu enpaŝu en la domon kaj iru antaŭen sur la dia vojo, ĝis li estos alvenita tie, kie li estas hejme ekde ĉiam kaj eterne.

La pordegon Bruno Gröning donis al siaj amikoj, li donis ĝin al ili en la manon. (El staniolpapero arkan pordegon). Li transdonis al siaj amikoj ankaŭ la pordegon por la komunumoj. La komunumo estas kaj restos la hejmo por la helposerĉantaj homoj, por la amikoj, por tiuj, kiuj volas labori en la verko de Bruno Gröning. Tiamaniere estas zorgita, ke la verko plue ekzistos en la ĉiama estonteco.

Bruno Gröning estis homo, kiu estis alie ol ni ĉiuj kune. Iam li diris al mi: “Mi akceptis vin ĉiujn en mia koro.” En ĉi tiuj 25 jaroj ankaŭ ni komencis eksenti malgrandan parton de tio, kion li kapablis, aferoj, kiuj pro la naturo estas malfermitaj al ĉiuj. Ankaŭ ni povas akcepti en nian koron, kiun ni tre amas. Ankaŭ ni povas fari multon, se ni lasas nin gvidi. Ni ĉiuj supozas, ke en ni dormetas diversaj aferoj. Ĉe Bruno Gröning ĉio estis maldormega kaj plene evoluinta. Kaj tio estis, kio ne nur mirigis nin,

sed tio estis senfine bona por ni. Longe ni ne ekkonis, ke li vere prenis tion serioza, kiam li diris:

“Mi estas nenio, Di-Sinjoro estas ĉio. Ne danku al mi, sed al Di-Sinjoro. Ne mi faras tion, sed Di-Sinjoro.”

Jes, en ĉi tiuj 25 jaroj ni ĉiuj komencis ekkoni, ke ni el ni mem estas nenio kaj scias kaj kapablas nenion, kaj ke li, Bruno Gröning estas granda ekzemplo por ni ĉiuj. Jes, ĉar li plene akceptis en si Di-Sinjoron, ĉar li , ĉar li nur aŭskultis je li, ĉar li sekvis nur la Dian volon, ĉar li kredis nur je la bono kaj ne faris ion malbonan.

Li diris ankaŭ: “La homoj diris al mi majstro, jes, kiu estas majstro? Kiu ekzemple plene regas sian metion, tiu estas majstro. Ekzistas seruristo-majstroj, tajloro-majstroj, ĉarpentisto-majstroj ktp. Mi deziras, ke vi fariĝu majstro de la vivo!”

Por la helposerĉanto, por la amiko de Bruno Gröning eblas en lia verko, trairi ĉiujn ŝtupojn de la lernejo pri la vivo. Ĉi tiun celon donis Bruno Gröning al ni amikoj. La instruisto estas Bruno Gröning kaj ni estas favoritaj esti liaj lernantoj.

Sukcesraporto de

sinjoro W. R.,
Hürtgenwald 1
en januaro 1984



1) Evoluo de la malsano - ŝarĝoj:

En 1969 mia familia kuracisto sciigis al mi, post li faris diversajn ekzamenojn pri mia sango, ke li devas direkti min en malsanulejon. Al mia demando "Kial?" li klarigis al mi, ke la sangostato estas tiel malbona, ke oni devas esplori, de kie tio venas!

Mi iris al la malsanulejo kaj post la ekzamenoj la kuracisto diris al mi, ke miaj leŭkocitoj estas tre altaj, sed li ne povas klarigi, de kie tio venas. Krome mi suferus diabeton (480 mg). Mi ricevadis medikamentoj kaj post tri semajnoj oni sendis min hejmen.

Post unu semajno mia familia kuracisto denove ekzamenis mian sangostaton. Post la ekzameno li sciigis al mi, ke la rezulto estas ankoraŭ pli malbona ol antaŭ mia restado en la malsanulejo.

Mi devis denove veni tien kaj la ekzamenoj komenciĝis denove. Inter alie ankaŭ estis rentgenita miaj renoj. Poste la kuracistoj klarigis al mi la rezulton:

- 1) grava veneniĝo de la renoj per fenacetino,
- 2) altgrada diabeto.

La plej malbona estis jeno: Post la analizo de la rezultoj la kuracisto diris al mi dum ĉeestis mia edzino, ke plejlonge, se mi sekvus liajn konsilojn, mi vivus ankoraŭ nur du jarojn. En mi rompiĝis mondo; ĉar ekde nun ĉiam estis antaŭ miaj okuloj la morto, mi ja estis nur 39-jara. Tiam komenciĝis en mi malsano, pri kio mi ne havis klarigon. Ĉiam depremite, preskaŭ ĉiam mi ploris, mi havis teruran timon kontraŭ homoj. La diagnozo de mia kuracisto estis: endogenaj depresioj. Kiam tio fariĝis ege malbona, mi devis veni en neŭrologian malsanulejon. Tiamaniere komenciĝis vojo tra la infero.

En la kliniko mi ne plu volis vivi kaj prenis la dormigajn tablojdojn kolektitajn de mi. Oni reanimigis min. Post sesmonata terapio kaj donado de medikamentoj mi estis sendita hejmen. Sed ne okazis granda pliboniĝo. Poste mi devis iri en la sanatorio de la landa asekura asocio LVA. Tie oni sciigis al mi surbaze de la ekzamenaj rezultoj, ke mia labora vivo estas finita, oni pensiigis min. Tion mi tute ne povis elteni kaj kiam mi denove estis hejme, mi faris la duan provon de memmortigo. Mi vekiĝis en la intensiva sekcio de neŭrologia kliniko. Poste mi venis en la fermitan sekcion. Tie mi vivis kvaŭ pun-kaptito. Viziti min rajtis nur mia edzino. Mi ricevis tie multe da medikamentoj, kelkfoje mi tute ne sciis, kie mi estis. Post okazis pliboniĝo post 10-monata kuracado, mi povis prove veni hejmen.

Post iom da tempo miaj depresioj fariĝis denove ege for-

taj, mi denove prenis multajn dormigajn tablojdojn. En la malsanulejo Simmerath mi vekigis. Poste mi estis kuracata per Anafranil-infuzaĵoj. La medikamento sukcesis bone kaj mi fartis iomete pli bone, poste denove malpli bone. Tiel estis jaro post jaro ĉiam same. Du- ĝis trifoje en la jaro mi iris en malsanulejon por kuracado. Mi jam akceptis la sorton, esti ŝarĝita dum la resto de mia vivo per depresioj.

Intertempe mi al kutimiĝis al la dormigaj tablojdoj tiel, ke mi ne plu povis elteni sen ili. Mi fariĝis dependa de Barbiturate. La plej stranga estis, ke mi trovis apotekon, kie mi ricevis ĉiun kvanton da Vesparax. Mi jam uzis ĝis ses pecojn, vespere por la dormo kaj tago, kaj tage fortan kafon por ekscito.

En oktobro 1980 mi estis denove en malsanulejo por kuracado de la depresioj. Je mia plej granda miro mi subite fartis tute alie ol kutime. Mi ne povis klarigi, kio okazis pri mi. Vespere mi ne havis sopiron je dormigaj tablojdoj, tamen mi dormis tute bone.

La sekvan tagon mi rakontis al la kuracisto, ke mi ĉiam prenis ege multajn tablojdojn. Tuj li volis instigi, ke mi faru sesmonatan sentoksigadon. Mi defendis min kontraŭ tio kaj ĉiam denove diris, ke mi ne plu prenas tablojdojn, ĉar subite mi sentis min interne sufiĉe forta kaj libera. Mi ne povis klarigi, kial subite estis tiu sento en mi.

Post mi revenis hejmen post iom da tempo kaj feliĉe rakontis al mia edzino, ke mi tute ne plu havas sopiron je tablojdoj, ŝi diris al mi, ke bonaj konatoj agordiĝis kaj preĝis por mi. Tiam ŝi demandis min, ĉu mi estus preta viziti kun ŝi familion Winkel. Post longa hezito mi akceptis kaj ni vizitis familion Winkel.

Kiam ni estis en ties loĝĉambro, kaptis mian rigardon bildo de viro, kiu iamaniere ŝajnis al mi konata. Tiun mi jam ie vidis, sed mi ne volis demandi, kiu li estas. La interparolado tie havis bonan efikon al mi kaj denove hejme mi demandis mian edzinon, kiu la viro sur la bildo estas. Ĥi rakontis al mi, ke tio estas sinjoro Gröning. Nun mi povis memori, ke en 1949/50 mi legis pri liaj sanigaj sukcesoj. Nun mi povis klarigi multon kaj havis grandan esperon.

Tiam venis por mi la unua komunumo-kunveno ĉe familio Winkel. Sinjorino Häusler parolis kun mi kaj klarigis, kiel mi akceptu la sanigan kurenton de sinjoro Gröning. Post la kunveno mi sentis min tre bona kaj konstatis, ke interne mi estis pli libera.

Mia edzino kaj mi nun ĉiutage agordiĝis kaj post iom da tempo plene malaperis la depresioj, pro kiuj mi suferis plurajn jarojn. Mi denove povis ridi kaj senŝarĝe interparoli kun aliaj homoj sen ia timo.

Ĥis hodiaŭ la malsano ne plu reaperis. Jam pasis tri jaroj. Mia sangostato estas denove normala, kaj ankaŭ la diabeto normaliĝis. Sangosukero 90 - 120 mg. Ankaŭ kontraŭ tio mi ne plu prenas medikamentojn.

Ĥi ĉion mi dankas al la helpo de Bruno Gröning. Mi estas konvinkita, ke nur helpe de li kaj de Dio mi estas hodiaŭ tute normala homo, ĉar ne nur malaperis la malsanoj, sed ankaŭ ŝanĝiĝis mi interna sinteno pri la vivo. Nun mi povas denove vivi kun ĝojo.

Dankon al mia amiko Gröning!

Sukcesraporto de

sinjorino E. K.
pri sia patro P. H.
el Kolonjo
en decembro 1983



Mia patro estis plej grave malsana. En 1965 li suferis korinfarkton. En 1981 venis nekontrolataj pensado kaj parolado, kio malpliboniĝis ĝis 1982. La konfuziĝo estis totala. Somero 1981: Ega malforto en la kruroj kaj doloroj, pro tio li apenaŭ iris. Aŭgusto 1982: Tre fortaj doloroj en la brusto kaj maldekstra ventroflanko. La kuracisto donis tablojdojn, tiam estis tri semajnojn certagrade pli bone. Poste denove aperis fortaj doloroj. La ekzamenoj rezultigis, ke mia patro havis en la tuta korpo kanceron, ne plu povis engluti ion kaj ke la prostatato estis atakita. Por la konstato de la diagnozo li estis en la sekcio pri internaj malsanoj kaj en la urologia sekcio. Ambaŭ kuracistoj konfirmis la rezulton.

Ekde la komenco de decembro 1982 li restis en la listo. La stato de mia patro konstante malpliboniĝis kaj por mia patrino kaj mi la hejma flegado fariĝis tro malfacila. En februaro 1983 ni serĉis flegistinon. Nun estis, ke mia patro

havis je unu gluteo kaj je la kalkanoj jam tre grandajn truojn pro la kuŝado, la digestado estis nur ĉiu kvina semajno, li vomis ĝis en la nokton, fine nur viskozan mukon, la preno de nutraĵo estis preskaŭ nebla. Kion li prenis, tio revenis. La tuta korpo estis plena de metastazoj, la tumoroj sub la sternumo kaj la prostato pli malboniĝis, aperis fortaj doloroj en la kruroj, brakoj kaj la tuta korpo. Kontraŭ tio estis donataj fortaj medikamentoj kaj morfino, fine tuta ampolo. La korpo estis tiom magriĝinta, ke mi apenaŭ trovis lokon por injekti. La ventra haŭto susuris, la korpo estis plene sekiĝinta. Tri semajnojn li ne plu estis kapabla je movoj. Fine de februaro la kuracisto donis al mia patro ŝancon por vivi ankoraŭ nur du semajnojn.

Fine de februaro venis la nova flegistino en la hejmon. Estis sinjorino Löllgen. Kiam ŝi vidis la staton de mia patro, ŝi demandis min, ĉu mi volus helpi ĉe la flegado. Mi jesis tion. Tiam ŝi diris al mia patrino kaj mi: “Tiam kreu, ke li saniĝos!” Ni ambaŭ diris kvazaŭ el unu buŝo: “Ne, tion ni ne kredas, ĉar la kuracisto ja diris ...” Sinjorino Löllgen rediris: “Tiam mi volas kredi por vi kaj mi konas iun, kiu povas kredi ankoraŭ pli bone!” Pense ŝi opiniis: Bruno Gröning ankoraŭ povas helpi tiukaze.

Sukceso:

Ekde tiam komenciĝis ŝanĝo pri la stato de mia patro. Ekde la 4a de marto mia patro denove havis regulan digestadon kaj la dekstra mano estis denove normala. La baro en la vejnoj kaj la sentemo de doloroj malaperis. Du tagojn poste li ne plu bezonis morfinon. Li sidis kaj iris kelkajn paŝojn. Sinjorino tuj komencis doni al li fortajn trinkaĵojn (elpremitajn oranĝojn kaj citronojn, mielon, glukozon, ovoflavon kaj bananon). Li povis gluti iomete pli bone kaj ne plu vomis. Ekde la 8a de marto li ne plu bezonis sendolorigajn medikamentojn. La 10an de marto

disiĝis la nigra loko ĉe la gluteo, kie estis la dekubito. Tiu estis ĉ. 10 cm longa kaj profunda kiel 2 fingrojn alta. La vundorandoj estis bone trasangataj, kaj la vundoj pli malgrandiĝis de tago al tago, ĝis ili plene resaniĝis. Krome ordiĝis lia pensa mondo kaj li denove interesiĝis pri la medio. La vortoj denove estis bone formataj. La 11an de marto li povis preni la unuan tagmanĝon, kaj la vespermanĝo konsistis el pano kun hepata kolbaso.

La 17an de marto mi havis la feliĉon, esti enkondukata ĉe sinjorino Häusler en la instruon de Bruno Gröning kun mia patrino, mia edzo kaj niaj ambaŭ infanoj. Ekde tiam evoluis ankoraŭ nur antaŭen. La paŝoj pliiĝis kaj la 26an de marto li jam povis esti lavata en la banejo. Tri semajnojn mia patro preskaŭ nur dormis, estis en la vera senco saniga dormado. Ekde la 29a de marto mia patro estas tute sana. Li manĝas kaj trinkas bone. Li plipeziĝis tiom, ke la pantalonoj denove estas konvenaj.

La 19an de aprilo mia patro iris la unuan fojon unu ŝtuparon kaj duonan supren kaj malsupren. La 25an de aprilo mia patro venis al mi por vizito. Mi loĝas du domojn apude. Ekde julio 1982 li ne plu estis ĉe mi, kaj antaŭe tiu vojo eblis al li nur kun plej granda peno.

Je la pentekosta kunvenego 1983 mi povis esti kun mia patro kaj mia patrino ĉe la tombo de Bruno Gröning. Tio estis por ni, sed ankaŭ por ĉiuj amikoj, kiuj ĉeestis, granda travivaĵo. Mia patro povis supreniri la monton en sia aĝo de 80 jaroj. Tio estis la plej longa ekskurso post longa tempo.

La kuracistoj ne povas kompreni, kio okazis pri mia patro. Nia koro estas plena de danko al la amiko Bruno Gröning kaj nia ĉiela patro.

E. K.

Finparolo

Post 25 jaroj ni ekkonas per respektemo kaj granda dankemo, kiun vivotaskon Dio donis al Bruno Gröning. Post 1959 la vorto kaj instruo de Bruno Gröning plue efikas. Por la homoj, kiuj povis enkontigi por si la sukceson antaŭ 1959, kaj por tiuj, kiuj reakiris la ordon en la korpo post 1959, ĉiam estas la tute sama bona forto. Ĉi tie temas pri faktoj. Kaj tiamaniere ni povas obee paroli pri la efikado de helpema amiko kaj lia vorto en la fermita tempospaco de kvarona jarcento. 25 jaroj da efikado laŭ la volo de Dio, 25 jarojn la alvoko por returni de la suferiga vojo, por delasi de la malbono:

Kion Bruno Gröning efikis al ni homoj per sia vivo kaj sia senlaca ago, tion ni hodiaŭ ankoraŭ ne povas plene ekkoni. Sed la spiritaĵo estis malfermita al ni. La spirita ligo inter la homo kaj Dio estas restarigita kaj la saniga kurento estas akceptata.

Bruno Gröning plene konsciiĝis pri sia vivo kaj plenumis la taskon, regvidante la homojn al sia origino, alvokanto al la granda returno kaj klarigante, pro kio ni estas favoritaj esti sur ĉi tiu belega tero:

“Di-Sinjoro estas nia Patro, kreinto de nia Tero. Li donis al la homoj la taskon per la vortoj:

Kresku kaj plimultiĝu!

Li kreis la teron, por ke ĝi estu paradizo, la homo konservu ĝin en ordo.

Kion faras kaj kion faris la homo? - Detruadon! Kial? Ĉar li fakte estas kaptita de Satano. Tia li ne estus, se li konservus la veran, homan instinkton. Tiun li perdis, kaj mi volas redoni ĝin al li.”

Per ĉi tiuj vortoj kaj sia ago li plenumis sian verkon. Ni povas aŭskulti je Dio kaj ricevas la forton por sekvi. Ni denove sentas la bonon, ni ekkonas la malbonon, ni ricevis la ludregulon por la vivo.

Hodiaŭ post 25 jaroj da efikado de Bruno Gröning ni plu demandas nin: Kiu bezonas la helpon kaj la akiron de la ordo en la korpo nun kaj en la estonteco? Ĉu ĉi tie la vorto pri la plagitoj kaj ŝarĝitoj ne estas la ĝusta respondo? La amikoj de Bruno Gröning ekkonis, ke homoj bezonas la helpon de Dio per la vorto de Bruno Gröning, ĉiuj, kiuj volas vivi en la ordo de Dio. La suĉinfano, la malgranda infano ricevas la Dian kurenton, la infanoj konscie konatiĝas kun Bruno Gröning kaj lia instruo en la komunumo por infanoj, antaŭ ĉio la junularo luktas pri la problemoj de la nuna malmola tempo kaj plej necese bezonas la helpon kaj la protekton kontraŭ ĉio malbona! Kaj tiel estas pri ĉia vivoaĝo.

Tiel la homoj, kiuj serĉas helpon, fariĝis komunumo, familio, ĉirkaŭ Bruno Gröning, kiu la bonon, la Diecaĵon volas, serĉas kaj trovas. Ĝi volas konservi la verkon de Bruno Gröning kaj helpi transdoni ĝin en la ĉiaman estonecon, por ke realiĝu tio, kion Bruno Gröning diris:

“Ĝi ne estas haltigebla.

En la tuta mondo okazu la saniĝo.”

Kaj hodiaŭ en la jaro 1984 la homoj sin demandas, kiel okazu la saniĝo, kiam la pereco de la homaro estas proksima?


En la lasta prelego, kiun li faris en la malfrua aŭtuno 1958 en Rosenheim, Bruno Gröning indikis kun eksterordinara emfazo jenajn vortojn, kiujn d-ro med. Erwin Gamber skribis je la fino de sia libro “La kaptado de la vivaĵo fare de Lucifero”:

“Per la nuklea bombo ni scias hodiaŭ, ke per unu sola atomo, se ĝi kaŭzas 'ĉenan reakcion', povas esti efikata terura detruado.”

Sed por ĉiu, kiu volas kompreni ĝin, malantaŭ ĉiu okazonta hororo hele lumas la vera lumo kaj la sola vereca espero. Iam Dio, la Sinjoro, konstruos Sian reĝan regnon sur ĉi tiu planedo. Tiam regos vera paco kaj justeco. La turmentanta, detruanta influo de la 'murdisto de la komenco' estos forigita. Sole en ĉi tiu lumo ni vere scias. Bonon al tiu, kiu povas diri kiel Albert Schweitzer:

“Kiel nekonato kaj sennomulo Li venas al ni, same kiel Li aliris je la bordo de la lago al tiuj viroj, kiuj ne sciis, kiu Li estis. Li diras la saman vorton: “Sed vi sekvu Min!” kaj metas nin antaŭ taskojn, kiujn Li devas solvi en nia tempo. Li ordonas. Kaj al tiuj, kiuj obeas Lin, al saĝuloj kaj malsaĝuloj, Li sin rivelacias per tio, kion ili estos favoritaj travivi je paco, efikado, bataloj kaj suferoj, kaj kiel neelpa-rolindan sekreton ili ekscios,

kiu Li estas ...”



Mi estas ĉi tie kaj ĉie samtempe

Indiko pri la fontoj

A. Kaul, d-ro fil.,
“Das Wunder von Herford” (La miraklo de Herford)
Lauda-Verlag, Laudenschlag-Bergstrasse

Revue

Kurt Trampler, d-ro fil.
“Die grosse Umkehr” (La granda returno)
Heering-Verlag, Munkeno

Film-Kurier de Rolf Engler Film Produktion

“Die grosse Umkehr” n-ro 1, 1950 Rosenheim

Skribaĵoj kaj fotoj el Arkivo de Bruno Gröning. Ni dankas al la nekonata fotisto pro liaj fotoj.

Mi rekomendas:

Bruno Gröning - Helpo kaj saniĝo per spiritaj fortoj
M. kaj C. Fortmann, Informkajero
Mendonombro 232.1 ESP

Bruno Gröning - Enkonduko en lian instruon
Grete Häusler (Eldoninto)
67 paĝoj, broŝurita, en Esperanto
ISBN 3-927685-28-3

Bruno Gröning - Sentencoj
Thomas Busse (Eldoninto)
77 paĝoj, broŝurita, en Esperanto
Mendonombro 130.1 ESP

Tekstkasedo:

Enkonduko en la instruon de Bruno Gröning
2 x 30 Min., Mendonombro 311.1 ESP

Per enkonduka prelego sinjorino Grete Häusler mallonge prezentas la instruon de Bruno Gröning.

Videobendo:

Vivo kaj verko de Bruno Gröning - Thomas Eich
Duonhora videobendo en Esperanto
Mendonombro 410.2 ESP

Kaj en la germana:

Matthias Kamp
Revolution in der Medizin
Rehabilitation eines Verkannten.
Eine ärztliche Dokumentation
563 S. broschiert, ISBN 3-927 685-20-8

Matthias Kamp
Heilung auf geistigem Wege durch die Lehre Bruno
Grönings
122 S. broschiert, ISBN 3-927 685-32-1

Grete Häusler (Hrsg.)
Das Heil erfahren, das ist Wahrheit
175 S. broschiert , ISBN 3-9801302-3-1

Thomas Eich
Das Wirken Bruno Bruno Grönings zu seinen Lebzeiten
und heute
308 S. broschiert, ISBN 3-927 685-43-7



Grete Häusler GmbH-Verlag

